


# Turka Stelo



## SALUTON,

Jen nia februara numero!

Jam naĝis en nia regiono sed la naĝo ne restis tre longe sur la grundo... Mi esperas, ke vi ankaŭ en via regiono, almenaŭ tiuj, kiuj loĝas en la norda hemisfero, jam vidis neĝon... Do nia revuo estos bona solvo por la malvarma vetero en la ekstero...

La vakciniĝo komenciĝis en nia lando... Nun en la fino de januaro oni komencis vakcinigi tiujn, kiuj estas pli aĝaj ol 75 jaroj... Ni esperu, ke la vakcino estos sufiĉe bona helpo por trakti la viruson...

En ĉi tiu numero estas tre interesaj tekstoj por via legado... jen kelkaj el ili:

- En tempo sigelita angulo estas la rakonto pri du pioniraj filmoj de sciencfikcio...
- En la greka mitologio angulo estas la rakonto pri Leonido
- En la angulo pri scienco vi legos pri kio

malkovriĝis en la nuboj de venuso lastatempe

- Jen humuraĵo el Litovio: "Ĉesu vi"
- En ĉi tiu numero troviĝas multaj poemoj
- Ŝercoj kaj krucvorttenigo
- Facilaj legaĵoj
- Literaturaĵoj
- Novaĵoj

kaj multaj aliaj tekstoj...

Bonan legadon al ĉiuj !

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Korektendaĵo	2
Juna Amiko ILEI	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Ciklo kun Hori Jasuo	4
Tempo Sigelita	5
LEONIDO (ΛΕΩΝΙΔΑΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
El la libro de "Dao de Jing"	10
La Kimero - Rakonto el la estonteco (9)	11
Cigno, Ezoko kaj Kankro	12
Du Poemoj	12
Poemo	12
El la literaturaj paĝoj de MAS	13
La Preĝejeto	14
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	15
Rapideco	16
Astrologio - Februaro/Akvistoj	16
Evi el Halle/Saale (1988)	17
Al la plenluno	18
Hajkoj	18
Mia korespondanto Yda Wei (Veĵdo)	18
La Sorto (EKRA2020)	19
La Muelilo (EKRA2020)	19
Mirinda renkonto (4/10)	20
Ĉesu vi	21
La tute aparta kato (parto 1)	23
Julio Baghy nun estas 130 jaraĝa	24
Viva memoraĵo	24
Ŝercoj	25
Krucvortenigmo	25
La Vivo (Az élet)	25
Kio okazas en la nuboj de Venuso?	26
HO, HOMARO! (aŭ invito al medito)	29
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Parteciploj
- 13/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

## Korektendaĵo

La rakonto "Senplumuleto" de Ivaniĉka Magharova publikigita en la januara numero de Turka Stelo ne estas konskursajaĵo en branĉo humuraĵo de EKRA 2020 festo, sed rakonto el la libro de Magharova "Malfermetita animo" (rakontoj bulgarlingve kaj esperante), kiu estis prezentita dum tiu festo.

Ni pardonpetas pri tiu eraro.

La redakcio

## Juna Amiko

- Revuo kun varia, aktuala temaro
- Bunte ilustrita, profesie pretigata eldonaĵo
- Tre internacia redakcia teamo
- Rigora lingva kontrolo

Aperas 4-foje jare, perpoŝte aŭ rete liverata.

Perantoj en 35 landoj akceptas viajn abonojn.

Tarifoj por la kalendaro jaro 2021 en eŭroj

	A-landoj	B-landoj
Papera	18	13
Reta	11	7



## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



**La 67-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis inter la 10-a kaj 24-a de januaro 2021**

### Analizo

A. **Partoprenantoj:** 356 el 34 landoj

B. **La tuta nombro de partoprenantoj ekde septembro 2009** ĝis nun 13 620 homoj (2009.9-2021.1)

C. **Laŭlandaj nombroj:**

1. Japanio: 66; 2. Koreio: 42; 3. Francio: 37; 4. Ĉinio, Tajvano kaj Brazilo: 30; 6. Germanio: 22; 7. Pollando: 18; 8. Rusio: 14; 9. Italio: 13; 10. Britujo kaj Hispanio 10; ...

Ĉ. **Perfektaj venkintoj** (15 venkoj): 324 el 356 (91,0%)

D. **Kvanto de legitaj paĝoj** pli ol 20 000

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>



## UEA



N-ro 926 (2021-01-21)  
**Mesaĝo okaze de la Internacia Tago de Edukado, 24 januaro 2021**

Universala Esperanto-Asocio (UEA) kunagas kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en tiu ĉi mesaĝo okaze de la Internacia Tago de Edukado 2021. [...]

N-ro 925 (2021-01-20)

**Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro, 27 januaro 2021**

Ĉiujare, la 27-an de januaro, ni markas la Tagon de Holokaŭsta Memoro, tagon de funebrado pro la milionoj kiuj perdis la vivon kaj de honorigo de tiuj kuraĝaj individuoj kiuj helpis savi la vivon de aliaj kiuj aliokaze pereus. [...]

N-ro 924 (2021-01-18)

**Proponoj por la hibrida IKU en Belfasto bonvenaj ĝis 31.1.2021**

La periodo por sendi proponojn por la Internacia Kongresa Universitato en Belfasto estis plilongigita.

Resumon kaj biografieton bv. sendi al la IKU-sekretario [...]

N-ro 923 (2021-01-17)

**Esperantologio, la faka revuo de CED, bonvenigas recenzojn pri libroj**

Esperantologio / Esperanto Studies (EES) estas faka revuo pri ĉiuj fenomenoj rilataj al Esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto [...]

## TEJO



**Kion vi lernis dum la pandemio? Kontribuu al nia**

### nova video

Kontribuu al la sepa epizodo de la serio Esperantistoj kaj kronviruso! La limdato por sendi vian videon estas la 7-a de februaro. Kion vi lernis dum la pandemio? [...]

**Mesaĝo okaze de la Internacia Tago de Edukado**

Universala Esperanto-Asocio (UEA) kunagas kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj la [...]

### Membriĝu en TEJO!

Iĝu parto de nia tutmonda komunumo! Se vi aĝas ne pli ol 35 jarojn – membriĝu en TEJO! Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la Revuon Kontakto kaj [...]

### Kultura Horo de TEJO

Ĉu vi volas kunhavigi vian talenton kun homoj el la tuta mondo? Ĉu vi volas kontribui al Esperanto-kulturo? Kiu ne volus? Do aliĝu al la Kultura Horo de TEJO! [...]

**TEJO serĉas spertulojn pri pluraneco kaj klimata agado**

Ĉu vi estas TEJO-anoj kaj spertas pri klimato, homaj rajtoj, junulara agado aŭ intersekieco/pluraneco/ kontraŭbatalo de diskriminacio? [...]

### IJK 2022 okazos en Nederlando

Ni ĝojas anonci ke la 78-a Internacia Junulara Kongreso IJK 2022 okazos en De Roerdomp – Westelbeers, Nederlando! “La loko estas vere mojosa, kiel propra vilaĝo kun esperantistoj”, [...]

## Leteroj de niaj legantoj




Saluton!

Mi bonorde ricevis vian sendaĵon. Koran dankon!

Feliĉan Novan Jaron kaj ĉion bonan!

**Jozefo Nagy** el Rumanio



Karaj,

Multajn dankojn pro via revueto bezonanta multan laboron.

Nia estinta gazeto estis nur 25-paĝa, sed mi multe laboris pro ĝi.

Nu, la 32 paĝoj multe pli da forto bezonas.

Multajn pliajn sukcesojn kaj al vi, kaj al TS!

Havu ĉion bonan en 2021! Elkore

**Adri** el Hungario



La kuranta numero de La Turka Stelo estas ankaŭ via donacaĵo je sojlo de Novjaro,

Amike,

**Bardhyl Selimi** el Albanio




Karaj,

Denove koran dankon pro ĉi tiu belega revuo ! Mi deziras al vi bonan gliton en espereble bonan kaj sanan Novjaron ! Ĉu vi festas? Ĉi tie preskaŭ ĉio estas malpermesata, sed mi konsentas kun la plejmulto da reguloj.

Amike,

**Frank Lappe** el Frankfurto




Estimata redaktoro Saluton!

Gratulon pro la publikigo de Turka Stelo 60-a numero en 2020 decembro ! Mi esperas,

ke la publikigo de Turka Stelo daŭros regule ! Dankon !

**Navin Shrestha** el Nepalo



Koran dankon pro la sendado de TS revuo kaj feliĉan jaron 2021. Espereble iom post iom Covid19 ne plu estos la konstanta temo de niaj konversacioj, pensoj, legaĵoj ktp... La nova jaro estu instigo por ŝanĝi niajn vivojn al io pli riĉa je ĉiu angulo. Post la pasintjaraj fajroj la naturo reverdiĝas. Ankaŭ niaj koroj reverdiĝu.

Amike,

**Franciska Toubale** el Aŭstralio



Estimataj,

kun granda plezur' mi legis la lastan numeron de la revuo Turka Stelo. Ĝi estas interesa en have, belaspekta kaj informriĉa.


Des pli gravas, ke ĝi ĉiumonate aperas kaj estas ampleksa. Vi meritas multajn laŭdojn. Gravas, ke estu multaj legantoj en la nova 2021 jaro. Hodiaŭ mi sendas plian humuran rakonton pri esperantista vivo.

Ĉu iuj legas ilin? Mi esperas.

Ni fosu nian sulkon.

Amike,

**Laimundas Abromas** el Litovio



Dankon pro la revuo kaj bondezirojn pri sano kaj ghojo.

Amike,

**Luiza Carol** el Israelo

## Ciklo kun Hori Jasuo -- hajkoj kaj poemetoj de Elena Popova e Bulgario

Belega birdo –  
Fulgulo kun idoj.  
Natura ĉarmo...  
Kia trankvileco en  
la akva ĉirkaŭprenoj!..



**KUKUAS MI...**

Serĉas mi atente  
fremdan neston pretan  
por mia birdeto.  
Kaŝe tie, sen peti,  
mi ovojn demetas  
kaj kukuas kontente.  
Kukuas mi printempe,  
mi, birdo saĝulo,  
laŭnome Kukolo.

Ku – ku ...



verkis kaj sendis **Elena Popova**  
el Bulgario  
bildo de **Hori Jasuo** el Japanio



## Vojaĝo al Marso kaj Luno kaj du pioniraj filmoj

Kiel komenciĝis la homa intereso pri spaco?

Historiaj dokumentoj montras al ni ĉefe tri civilizojn: sumeranoj, babilanoj kaj antikvaj egiptanoj. Antikvaj grekoj venas pli poste.

Kiam ni rigardas al la antaŭhistorian epokon, ni trovas la jenajn rezultojn: "Ĉirkaŭ la jaro 8000 a.K. la kalendaro Warren Field en la valo Dee River en la regiono Aberdeenshire en Skotlando, la monumentoj de Stonehenge en Anglio, la Nebra Ĉiela Rado en la elfosejo Nebra en la ŝtato Saksio-Anhalto en Germanio, la observatorio en Norda Makedonio sur la formortinta vulkana monteto konstruita ĉirkaŭ la jaro 1800 a.K., kaj la Oraj Ĉapeloj malkovritaj en Germanio, Francio kaj Svislando rilate al la kulturo Urnfield pri la tradicio kemacii la mortintoj kaj enmeti ilin en urnoj dum la bronza epoko." <sup>1</sup>

Homoj scivolemis pri planedoj, pri la malantaŭo de la malhela ĉielo, pri luno kaj suno, inventis kalendarojn, kaj faris kalkulojn pri la ĉielaj korpoj.

La plej proksima scienca revolucio en la historio de astronomio, kiel ni scias, komenciĝas kun Koperniko. Rezulte de la esploroj faritaj kadre de la Sunocentra universa teorio, kiun establis Koperniko, la Geocentra universa teorio, kiu estis defendita ekde Eŭdokso, Aristotelo kaj Ptolemeo, estis flankenlasita kaj la teorio de Koperniko evoluis plue danke al la observado de Galileo, kaj la teorioj metitaj de Keplero. Tiel la fundamentoj de la moderna astronomio establiĝis.

Koperniko ne estis la unua persono, kiu asertis, ke Tero moviĝas, nek li asertis, ke li trovis la ideon si mem. En la antaŭparolo de sia verko, li memorigas multajn el la praj fontoj, kiuj antaŭe argumentis, ke la Tero moviĝas. En pli frua manuskripto, li eĉ aludis Aristarkon (ĉ. 310-230 a.K.), pro ties vidpunkto de la Sunocentra universo tre simila al la lia. <sup>2</sup>

Ĉi tiuj estis observadoj, kalkuladoj kaj teoriaj studoj rigardante al la planedoj en la spaco, la suno kaj la luno. Sed kio pri la ideo supreniri al la spaco? iri al luno? la ideo fari raketojn? kaj la ideo iri al Marso pli poste?

Pulvo-raketoj unue aperis en Ĉinio en la 13-a jarcento. Meze de la 13-a jarcento, ĉi tiu teknologio, kiu donis seriozan avantaĝon dum militoj, komencis disvastiĝi de Ĉinio al Eŭropo, Azio kaj Afriko. Tiu teknologio disvolviĝis paŝo post paŝo ĝis la 16-a jarcento, kaj ĝi ricevis la nomon "raketo" dum ĉi tiu periodo. La itala devenvorto "rocchetta", kiu signifas "bobeno" kaj "malgranda ŝafto", estis tradukita de la

itala al la germana kaj de la germana al la angla pere de libroj skribitaj pri raketa teknologio, kaj finfine ricevis la nomon "raketo". En la 17-a jarcento, la unua pilotata raketa flugo en la mondo estis onidire efektivigita de la turka inĝeniero Lagari Hasan Çelebi, kiu vivis dum la tempo de sultano Murat la IV-a. La okazaĵo menciita en la fama libro "Seyahatname" de Evliya Çelebi okazis en la jaro 1633. Lagari Hasan Çelebi flugis de Sarayburnu al Sinan Paŝa domo (ĝi estas mallonga distanco) pere de 60 kilogramoj da pulva pasto kaj la 7-flugila raketo, kiujn li inventis si mem, kaj tiel li enmetis sian nomon en la historio. <sup>3</sup>


La mirigan eksperimenton de Lagari Hasan Çelebi, en kiu li ĵetis sin per raketo, 477 jarojn poste denove realigis la fama dokumenta kanalo Discovery Channel en sia programo Mythbusters. La raketo de Lagari Hasan Çelebi, kiu laŭsupoze faris la unuan pilotatan flugon en la historio, estis denove realigita kaj pafita per la nuntempa tekniko. Tamen la rezulto estis seniluziiga: Kaj la raketo kaj la manekeno reprezentanta Hasan Çelebi frakasiĝis. Tamen Mauritz Roffavik, direktoro de la Norvega Aviada Muzeo, kaj Frank Winter, vicprezidanto de la Spaca Esplora Fakto de la fama Smithsonian Instituto en Usono, konfirmis, ke "la eksperimento kun la turka raketo de Hasan Çelebi en 1633 estis la unua registrita homekipita flugeksperimento farita iam ajn". <sup>4</sup>

Pli progresintaj raketoj uzataj en la Napoleonaj Militoj estus disvolvotaj nur fine de la 18-a jarcento. Eble kaj plej grave, la raketa teknologio, kiu ebligis homekipitan spacvojaĝon, aperis en 1903 danke al Konstantin Ciolkovskij. Post Ciolkovskij, la publikigo de la libro verkita de usona inĝeniero Robert H. Goddard pri raketa teknologio en la 1920-aj jaroj kaj la invento de la unua raketo per likva fuelo fare de Goddard estus unu paŝo pli proksima al la homekipita spacvojaĝo. <sup>5</sup>

Sekvas la raketa teknologio kaj aviadiloj, kiuj superis la sonrapidecon dum la dua mondmilito. Se ni asocias la ideon supreniri en la spacon kun la sopiro flugi, ni eĉ povas inkluzivi balonojn kaj zepelinojn, kiu flugis per gaso en ĉi tiun historion. Koncerne la ideon vojaĝi al la luno eble la unua spuro de tio en la literaturo estas la verko "Vera Rakonto" de Lukianos el Samosato, asiriano, kiu vivis en la dua jarcento post Kristo en urbo Adiyaman sur la terpecoj kie mi ankaŭ loĝas nun. Post tio venas la verko "Alia Mondo - Lunaj Ŝtatoj kaj Imperioj" de Savinien Cyrano De Bergerac en la 17-a jarcento. Ĉi tiu Cyrano estas la samnoma



**S**ur la land-vojo kondukanta de Ateno (Αθήνα) al la norda Helenujo, en distanco de 199 kilometroj, tre proksime al la urbo Lamio (Λαμία), estas impona monumento, kies ĉefa parto estas tre granda bronza statuo de antikva militisto. Temas pri la statuo de la granda, historia, helena kaj tutmonda heroo, Leonido. Mi diras “tutmonda”, ĉar la personeco kaj la heroaĵo de Leonido, dank’ al la belartoj de ĉiuj epokoj kaj landoj, estas vaste konata en preskaŭ la tuta, ĉefe en la okcidenta, mondo.



Leonido estis reĝo de Sparto (Σπάρτη), la militite plej potenca helena regno, forto preskaŭ nevenkebla, kies idoj, la teruraj Spartanoj aŭ Lacedemonanoj, ekzerciĝante en la armiloj ekde sia infanaĝo, estis militistoj temeraraj, al kutimiĝintaj al la ideo, ke en la batalo la viroj devas venki aŭ morti. Trian vojon la Spartanoj ne konis kaj tio igis ilin kontraŭuloj nealfronteblaj.

Apud la loko de la monumento, en la antikveco estis regiono nomata Termopiloj (Θερμοπύλαι). Tie, inter la tre kruta, tute rektoklina kaj neirebla deklivo de la monto Kalidromo (Καλλιῶρομον), kaj ne trapasebla, tre vasta marĉo, kiu finiĝis ĉe la maro, estis natura, unukilometra, mallarĝa defilejo, kondukanta de la suda Helenujo al la centra, al Tesalio (Θεσσαλία). Ambaŭ enirejoj kaj ankaŭ alia punkto, preskaŭ je la mezo de ĝia longo, estis tre mallarĝaj, kaj ĉe la eliro al la direkto de Tesalio estis kroma, defenda, ne alta murego. Tio, do, estis defenda punkto kun tre granda strategia signifo.

La nomo Termopiloj estas kunmetita el la vortoj “θερμός” (termos, signifanta “varma”, kaj “πύλαι” (pile, signifanta “enirejoj” aŭ “portegoj”). Tiu nomo estas donita, ĉar el la monta deklivo fontas varma, sulfurenhava akvo, do, la nomo signifas “varmaj portegoj”.

Ekde la jaro 550 a.K., kiam la reĝo Ciro (Κύρος) fontis la Persan Monarkion, Persujo iom-post-iome konkeris la plej grandan parton de la tiam konata mondo. La persa povo etendiĝis orienten ĝis la rivero

Induso kaj la orienta Himalajo, norden ĝis Kaŭkazo, suden ĝis Arabio, Etiopio kaj Nubio kaj okcidenten ĝis la marbordoj de Malgrandazio. Centoj da regnoj kaj popoloj estis submetigitaj al la persa forto, tamen tio ne sufiĉis al la nepo de Ciro, Dario (Δαρείος), glora reĝo de Persujo, kiu turnis sian atenton al Eŭropo, kies unua ŝtupo estas Helenujo.



Unue li konkeris multajn el la helenaj kolonioj de Malgrandazio kaj poste, en 495 a.K. li sendis multenombrian armeon kaj ŝiparon kontraŭ la helenan landinteron. Tiu unua ekspedicio malsukcesis, la Helenoj de Trakio (Θράκη) venkis kaj forpuŝis la persan armeon kaj la sovaĝa vetero, ŝtorma marleviĝo, detruis la persan floton.

Post kvin jaroj, en 490 a.K. sekvis la dua militiro, dum kiu 600 persaj triremoj kaj ne konata nombro da transport-ŝipoj kun 60.000 militistoj, naviginte tra Egea Maro kaj konkerinte multajn el la helenaj insuloj, atingis Atikon (Αττική), la vastan periferion de Ateno, la plej granda Helena regno, kaj kampadis en regiono nomata Maratono (Μαραθών). Tie okazis la mondkonata batalo, en kiu la persa armeo suferis totalan malvenkon.

Venis la vico de la posteulo de Dario, Kserkso (Ξέρξης), kiu, en 480 a.K. entreprenis la trian ekspedicion, en kiu estis mobilizita nekredinde granda nombro da militfortoj. La granda historiisto Herodoto (Ηρόδοτος) skribas pri 1.700.000 militistoj kaj pri 1.200 grandaj ŝipoj, triremoj, kun preskaŭ 200.000 kromaj marmilitistoj. La nombroj ŝajnas troaj, sed alia atesto ne estas, oni ja supozas, ke, vere, la tuta tiu militista forto estis eksterordinare granda kaj tion atestas ankaŭ la fakto, ke por trapasigi sekure al la eŭropa tero tiom multenombrian armeon, tiom da ŝarĝoj de armiloj kaj provizoj, Kserkso flospontis per centoj da ŝipoj Helesponton (Ελλήσποντος)!

Mi ne povas ĉi tie paroli pli detale pri tiu milito kaj pri tiuj kiuj sekvis, mi devas paroli pri Leonido kaj pri Termopiloj, kiujn la persa armeo atingis, pasinte tra la norda Helenujo, konkerinte, submetiginte aŭ detruinte multajn helenajn civitojn. Atinginte la centran Helenlandon, Tesalion, Kserkso devige ĉesigis sian ofensivon, li haltis antaŭ la sola irejo al la sudo, antaŭ la gardata defilejo de Termopiloj.

Dume, reprezentantoj de la plej militfortaj helenaj regnoj, kunveninte en Korinto (Κόρινθος), decidis ĉiuj kune alfronti tiun fojon la invadintojn. La estreco, la komando de la tuta terarmeo estis komisiita al la estro kaj reĝo de la Spartanoj, Leonido. Tiele, armeo el

6.000 militistoj marŝis norden kaj haltis ĉe Termopiloj, dum malarmeo el 240 triremoj moviĝis al la direkto de la tre proksima al Atiko insulo Eŭbeo (Εύβοια), por gardi la markolon per kiu la persa floto povus sekure ŝipiri suden.

Inter la helenaj militistoj estis nur 300 Spartanoj, malgranda parto de la sparta armeo. En Lacedemono (Λακεδαίμων) tiujn tagojn la Spartanoj celebradis sian lokan, plej grandan ĉiujaran religian feston, kiu daŭris naŭ tagojn. Pro tio, tiu taĉmento, la 300 militistoj, estis sendita kiel avano de la armeo kiu sekvus post kelkaj tagoj. Tiuj 300 viroj estis elektitaj de Leonido mem, ne nur ĉar ili estis kuraĝaj kaj milit-spertaj, sed ankaŭ ĉar ĉiu el ili havis almenaŭ unu filon. Tio okazis, ĉar, laŭ la kutimo kaj leĝaro de la Spartanoj, la tre danĝerajn ekspediciojn partoprenis viroj akirintaj filon, kiu, en okazo de ilia morto, restus post ili kiel protektanto kaj daŭriganto de la familio.

La persa armeo haltis kaj kampadis en distanco de kelkaj centoj da metroj malproksime de la defilejo kaj Kserkso estis certa, ke ĉe la vido de tiom granda armeo, la Helenoj senorde forkuros por sin savi. Tamen, tio ne okazis kaj la reĝo, laŭ sia kutimo, unue sendis heroldon kaj postulis de la Helenoj liveri al li la armilojn. Leonido respondis: "venu preni ilin" (Μολών Λαβέ), kaj tiu diraĵo restis eterna ne nur en la historio, sed en la animoj de la Helenoj, kiuj ĝis nun uzas ĝin ĉiufoje kiam oni postulas de ili neebulon. Kserkso miris kaj sendis spionojn, kiuj alproksimiĝis al la unuaj helenaj taĉmentoj, al la kampadejo de la Spartanoj, kiuj ekvidis ilin, sed tute ne atentis nek persekutis ilin. La spionoj raportis al la reĝo, ke la Spartanoj lavas kaj kombas siajn hararojn, ili gimnas-tikas, ludas, amuziĝas. Tio ŝajnis al Kserkso nekredibla, eĉ ridinda. Esperante ke la kontraŭuloj ŝanĝos opinion kaj atendante la alvenon de la ŝiparo, restis senaga kvar tagojn.

En tiu ĉi punkto mi devas noti, ke la grandan persan armeon konsistigis dekoj da armeoj, armeoj de la satrapioj, de la multaj submetigitaj regnoj, kiuj devis sekvi la persan armeon en la militoj de la granda reĝo. Tiuj armeoj estis fremdaj, malsamaj inter si, ĉiu el ili uzis sian propran lingvon, ili militis laŭ sia metodo, per siaj propraj, divers-specaj armiloj, sub la ordonoj de siaj propraj oficiroj kaj persaj estroj, kompreneble, nevolonte kaj, en krizaj, danĝeraj okazoj, sub skurĝobatado.

La kvinan tagon, Kserkso, indigninte pro la aroganteco de la Helenoj, sendis kontraŭ ilin armeon el Medoj (Μήδοι) kaj Kasianoj (Κάσσιοι), doninte la ordonon, ke oni kaptu kaj konduku antaŭ li la impertinentajn kontraŭulojn. Tamen, en la unua ŝtorma atako, la persaj batalantoj komencis fali po dekoj,



poste po centoj, do, post nelonge ili senorde retretis en tre malbona stato. Nur tiam Kserkso komencis konscii, ke la afero ne estas simpla. Dezirante, do, havi rapidan rezulton, li sendis la taĉmenton de la nevenkeblaj "senmortuloj", elektitaj, tre bone ekzerciĝintaj, persaj batalantoj. La Spartanoj retiriĝis en la defilejo kaj tie atendis la malamikojn, kiuj havis la saman sorton kun la venkitaj Medoj. En la defilejo ne povis esti amasa atako, do, la Persoj devis batali en mallarĝa loko kaj tie ili devis alfronti la grandajn kurp-tegitajn ŝildojn kaj la longajn pezajn lancojn de la Spartanoj. En la unua kolizio multaj Persoj falis kaj la ceteraj klopodis resti en sekura distanco, tamen, tiam la Spartanoj agis laŭ la metodo de Leonido, ili kuris returne, ŝajnigante ke ili retiriĝas kaj kiam la Persoj persekutis ilin kaj alproksimiĝis, ili subite returniĝis kaj de proksime, rapidege sin falis antaŭen kaj amase mortigis, masakris la surprizitajn malamikojn.

La facila venko je kiu esperis Kserkso, iĝis humiliga, totala malvenko. Malmultaj el la elektitaj persaj militistoj sin savis kaj revenis al sia kampadejo kaj tio vekis kroman timon al la ceteraj persaj fortoj. La fiera reĝo bone komprenis, ke la situacio estas kriza, ke la afero povas esti perdita. Tamen, li persistis. Supozante ke la Spartanoj, perdinte kelkajn, eble multajn siajn virojn kaj havante multajn vunditojn ne povos denove batali per la sama forto kaj kuraĝo, entreprenis multajn atakojn, tamen, ne nur la Spartanoj sed ankaŭ la ceteraj Helenoj, militante laŭvice kaj laŭ civitoj, same kuraĝe kaj rezultige, ne lasis la kontraŭulojn atingi la enirejon de la gardata defilejo. Kserkso uzis ĉiujn siajn batal-planojn, ĉiujn batalmetodojn, ĉiajn armilojn, sed li tute fiaskis.

Li estis en embaraso, li ne sciis kion fari kaj tiam sin prezentis al li iu Heleno, loka vilaĝano, viro nomata Efialto (Εφιάλτης), kiu, petinte kaj ricevinte grandan honorarion, prenis sur sin la taskon montri al la persaj komandantoj konatan al nur malmultaj lokaj montanoj padon, kiu, tra la deklivo de la monto kondukas al la kontraŭa enirejo de la defilejo, je la posto de la helena



armeo. Kserkso entuziasmiĝis kaj tuj faris sian planon, donis la ordonojn kaj la nokton, granda parto de la armeo ekiris ascende al la monto.

La Helenoj, kompreneble, sciis ke ekzistas monta trapasejo, sed ili estis tute certaj, ke la malamikoj ne povus ĝin trovi. Malgraŭ tio, mil Foceanoj (Φωκείς), estis senditaj sur la monto por ĝin gardi. La Persoj trapasis la riveron Asopo (Ασωπός), ili marŝis laŭ ties ravino, ili atingis la kaŝitan padon kaj dum la tuta nokto marŝis sur la monto. Kiam ili atingis la plej altan punkton de la trapasejo, trovis antaŭ si la gardantajn Foceanojn. En la komenco la persa komandanto Hidarno (Υδάρνης), opiniante ke antaŭ li estas ankoraŭfoje Spartanoj, ektimis kaj retiriĝis. Tamen, la perfidulo, Efialto, kiu gvidis la armeon, klarigis, ke tie estas ne tiom fortaj kaj lertaj militistoj kaj la Persoj batalviciĝis kaj atakis la Foceanojn. Tiuj lastaj batalis kuraĝe, tamen inter la kontraŭuloj estis multaj arkistoj, kiujn, estante en pli malalta, malebena loko kaj posedante nur malpezan armilaron, ne povis facile alfronti. Malgraŭ tio, ili faris ĉion kion ili povis kaj ĉar ili estis tuj senditaj kurierojn al la Helenoj gardantaj la defilejon, dezirante gajni tempon, moviĝis supren, klopodante devojigi, altiri al persekuto la malamikojn. Tamen, tiuj lastaj ne falis en la kaptilon, ili komprenis la artifikon, do, ili ne persekutis la Foceanojn, ili lasis tie taĉmenton por malhelpi eventualan ilian descendon kaj la cetera armeparto daŭrigis la iradon.

La anonco pri la perfido atingis ĝustatempe la Helenojn kaj tuj la estroj de la civitoj kunvenis en urĝa kunsido, en kiu, kompreneble, estis akceptite, ke la gardado de la defilejo ne estas plu ebla, ĉar la malamikoj venas el ambaŭ flankoj, do la rezulto estas tute certa. Estis decidite, ke la helena armeo retiriĝu kaj en sekura distanco decidu pri nova defenda plano. Leonido konsentis, li instigis ĉiujn foriri, sed li sciigis, ke la sparta taĉmento restos sur sia batal-loko, ĉar la Spartanoj neniam forlasas la batalkampon. La decido de Leonido, aprobita de ĉiuj liaj kunbatalantoj, estis konforma al la kutimo de la temeraraj militistoj, kiuj, tradicie, en la milito, precipe kontraŭ invadintoj kaj ofendintoj de la patrujo, devis ĝismorte kontraŭstari.

Kune kun la Spartanoj restis memvole 700 Tespianoj (Θεσπιείς) kaj 400 Tebanoj (Θηβαίοι).

La Spartanoj atendis pacience kaj tute trankvile la finan atakon de la malamikoj, ili estis kiel kutime sentimaj, tute trankvilaj. Ilia batal-plano estis tute simpla, ili devis kiel eble plej longe resti vivantaj, por mortigi kiel eble plej multajn malamikojn. Kiel elmonro de la temperamento de tiuj viroj estas notita de la historiisto impresa momento, kiam, loka, fuĝanta vilaĝano diris al grupo da Spartanoj, ke la malamikoj estas tiom multaj, ke iliaj sagoj kovras la sunon, “tio estas tre agrabla novaĵo”, respondis iu Spartano, nomata Deineko (Δηνέκης), “ĉar ni batalos sub ombro!”. Kaj kiam alia persono diris al Spartanoj ke la Persoj estas tre proksime al ili, unu el ili respondis “la vero estas ke ni estas tre proksime al la Persoj”.

Kiam Kserkso ricevis la signalon, ke lia duona armeo alproksimiĝas al la defilejo de malantaŭe, tuj entreprenis amasan atakon. Leonido, kiu nun sciis kia estos la fino de la batalo, ne plu restis en la mallarĝejo, li eliris sur la kampo kaj alfrontis rekte la atakantojn. Estis batalo kruela, en kiu tre rapide centoj da Persoj falis kaj la ceteraj turnis la dorson klopodante sin savi forkurante kaj forĵetante la armilojn. Tie, tamen atendis ilin la skurĝoj de la oficiroj, la sovaĝa interpuŝado de la devige kaj vane kontraŭstarantaj, sen armiloj plu, viroj. Multaj el ili, kurinte al la direkto de la maro dronis en la marĉo.

En la kontraŭa flanko, la Spartanoj, kondukataj de la heroo Leonido, ne plu pensante pri la fino, kun duobla kuraĝo batalis, senhezite ili atakis furioze la malamikojn, ili falĉis amason da ili, ili ŝtorme batalis malgraŭ tio, ke ili iĝis pli kaj pli malmultaj. Estis persa armeo el 20.000 militistoj en tiu batalo, tamen ĝi retiriĝis mult-foje, perdinte nekredeblan nombron da viroj kaj denove agesis la masivan korpuson de la malmultaj Helenoj.

En unu tia atako falis la granda heroo, falis Leonido, kiu, laŭ la sparta kutimo, kiel estro, batalis ĉiam sur la unua vico, antaŭ la ceteraj siaj viroj. Leonido falis kaj super lia kadavro okazis la plej violentaj kolizioj. La Spartanoj klopodis ĉiariske, ĉiuforte defendi, levi la korpon de la mortinto, dum la malamikoj klopodis ĝin fortreni. Estis kvar sinsekvaj, tre sangoverŝaj kolizioj, en kiuj falis multaj Spartanoj kaj barbaroj, inter kiuj du fratoj de Kserkso, Abrokomo (Αβροκόμης) kaj Hiperanto (Υπεράνθης).

Tiam alvenis de la malantaŭa flanko de la defilejo la ceteraj Persoj, venintaj tra la monto kaj jam forpuŝintaj la ceterajn Helenojn. La Spartanoj estis jam batataj de ambaŭ flankoj, ili estis ĉirkaŭitaj, tamen ili sukcesis retiriĝi sur apuda malalta monteto, portante la sanktan kadavron de sia estro. Tie estis ludita la



lasta akto de la dramo. La lancoj estis rompitaĵoj, la ŝildoj tre pezaj plu estis forĵetitaj, la Spartanoj batalis per siaj glavoj, poste per ponardoj, per pugnoj, per dentoj, la unu post la alia falis, post nelonge ĉiuj estis mortigitaj kaj la lasta sceno de la dramo estis finita!

Ĉio tio ĉi estis nur unu ankoraŭ batalo inter multaj aliaj, tamen ĝi estis sufiĉa por neniigi la aplombon de la Persoj kaj vekti la timon en la koroj de la invadintoj, eĉ de la reĝo mem, afero, kiu interalie kondukis al ties fina, totala malvenko.

Kserkso serĉis pri la kadavro de Leonido. Li trovis ĝin sub la korpoj de multaj viroj, kiuj senvivaj plu, protektis ankoraŭ la amatan estron. Kserkso, obeante al sia barbara instinkto, senkapigis la mortinton kaj ekspoziciis sur paliso lian kapon!

Leonido restas senmorta ne nur en Helenujo. Li iĝis objekto de artista admiro, temo de diversaj, mirindaj artaĵoj, inter kiuj la impresa, vaste konata,

antaŭ nelonge prezentita en la tuta mondo, filmo.

Pasis jam preskaŭ 2.500 jaroj, la bildo de la regiono de la nuntempaj Termopiloj estas tute alia, tute ŝanĝita. Ne plu estas defilejo, nun estas larĝaj vojoj kiuj kondukas al la nordo de la lando. Tie estas ĉiam la fontoj de la varma sulfurhava akvo, kiu altiras la intereson de multaj vizitantoj, tie estas la samnoma vilaĝo Termopiloj, arkeologia loko, precipe estas tie la monumento de Leonido kaj la 300 Spartanoj, sur kiu estas la jena antikva epigrafo: "Fremdulo, anoncu al la Lacedemonanoj ke ni kuŝas ĉi tie, obeinte al iliaj ordonoj"

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

## Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

### L.N.M. Newell (1902-1968)



Leonard Noel Mansell Newell naskiĝis en 1902, anglo laŭ deveno, sed envere monda civitano, kiu vivis kaj laboris ne nur en sia hejmlando, sed en multaj aliaj landoj: Francio, Italio, Belgio, Egiptio, Sudano, Aŭstralio. Samtempe li estis ĉiam fidela civitano de tiu ficcia lando sen limoj, kiun ni ofte nomas Esperantujo. Li lernis Esperanton kiel 14-jara knabo. Li partoprenis la esperantistan agadon en Londono kiel estrarano de Londona Esperanto-klubo; li estis kunaranĝanto de la Universala Kongreso de Esperanto en Oksfordo 1930; dum kelkaj jaroj li estis ĉefredaktoro de International Language, anglalingva revuo por propagandi Esperanton. Li havis multajn profesiojn dum sia vivo, sed ĉiam daŭre aktivis por Esperanto: instruis, organizis, redaktis, verkis, tradukis, kie ajn li trovis sin. Entute Newell estis unu el tiuj homoj, kiuj vivlonge dediĉis sin al ĉiuj flankoj de Esperanta agado, tamen sen bruo kaj ambiciaj klopodoj, ĉar li estis homo modesta kaj netrudema.

Kiel verkisto Newell eminentis kiel prozisto, lia

novelaro Bakŝiŝ (1938) estas rigardata kiel klasikaĵo de la Esperanta novel-arto. Sed li verkis ankaŭ poemojn, kvankam nur en malgranda kvanto; en Kolektitaj poemoj (1987), prizorgita de Edwin de Kock, ili sumas je nur 29 verkoj. Liaj poemoj estas klaraj, priskribe realismaj kaj ofte emaj al filozofiaj pensoj. En poemo, titolita Filozofo, li trovas araneon en prunteprenita libro: "Sur paĝo dudek-sepa mi trovis araneon; / Ĝi volis filozofi, sed trovis la pereon, / Anstataŭ kapti puŝojn, ĝi retis mond-enigmon". Por mi aparte simpatia estas poemo, kiun la poeto dediĉis amike al Idista poeto (jes, ankaŭ en Ido oni poetas); la poemo havas la titolon La Lasta, kaj tiel Newell komparas sian Idistan poet-amikon al romana soldato, kiu kuraĝe postenas ĉe la lasta landlimo, jam forgesita. Oni konstatas la kunsenton de la Esperantista poeto kun sia kolego Idista:

*Kiel soldato kantas romana,  
Sola ĉe l'lasta landlim' forgesita,  
Kuraĝa ĉe sia posteno  
Dum detruas patrujon barbaroj;  
Kiel sur morta tero mortkantas  
Siajn amatojn lasta homido,  
Sub neĝeroj silente ŝvebantaj,  
Atendante la blindan ĥaason:  
Tiel Idisto lasta vi kantas  
Morne al mondo, kiu forgesis  
La lingvon de vi amegatan.  
O poeto fidela, saluton!*

Kiel menciite, la noveloj de Newell jam havas rangon de klasikeco en la Esperanta proza arto. Kaj

ne nur pro elstara stilo, sed antaŭ ĉio pro priskriboj de realecaj scenoj kaj personaj portretoj, kiuj vivigas homojn kaj okazojn tiomgrade, ke ili partoprenigas la leganton en la rakonta proceso kaj sekve restas en la memoro. La noveloj de Bakŝiŝ havas sian okazeron en Egiptio, kie Newell pasigis du jarojn inter la mondmilitoj instruante Esperanton. La noveloj plejparte traktas la reciprokajn nekomprenojn kaj foje konfliktojn inter la malsimilaj kutimoj de Eŭropanoj kaj la moroj de Egiptoj. Kvankam la noveloj ja montras la eŭropecan perspektivon de la aŭtoro, li ofte simpatias kun la egipta flanko kaj ironias pri la brita kaj franca flanko. Emocie pensigaj estas du rakontoj, Edziĝpropono kaj La kriketludo, pri Eŭropaj virinoj, kiuj vojaĝas al Egiptio por tie ekvivi kun siaj egiptaj edzoj. Ili elreviĝo estas priskribita kun profunda komprenemo, ili spertas duoblan malfacilon: la fremdecon de alia kulturo kaj malestimon de aliaj Eŭropanoj pri iliaj rilatoj kun Egiptoj.

Newell estis diligenta tradukisto. Lia plej ambicia traduko estas tiu de Hamleto, 1964. Per sia traduko Newell celis tradukon multe pli precizan ol tiun de Zamenhof de 1894. Newell estis bone ekipita por tia traduko, li bone konis la lingvon de Shakespeare, liajn aludojn kaj la nuancajn signifojn, kiuj postulis detalan enkondukon kaj abundajn klarigojn. Por Newell la ĉefa devo de la tradukanto de Hamleto estas plej ebla

fideleco al la originalo kaj laŭeble ekzakta redono de nuancoj, eĉ je la kosto de pli arta versio, aŭ pli simpla legado, kiel ĉe Zamenhof. Tiu vidpunkto de Newell kontrastis kun tiu de alia Shakespeare-tradukinto, Reto Rossetti, kiu tradukis alian dramon, Otelo. Tiu konflikto rezultis en du skoloj koncerne tradukadon de Ŝekspiraj dramoj, la fidelisma skolo kaj la artisma skolo. Efektive, la du skoloj ne estas tiel draste diferencaj, ambaŭ havas siajn akcepteblajn flankojn kaj eblecojn de ekvilibro.

L.N.M. Newell multe kontribuis al la literaturaj revuoj de sia tempo, Literatura Mondo, La nica literatura revuo kaj Norda Prismo. Li multe tradukis el la angla poezio, i.a. la plej faman poemon de Coleridge, La Maljuna Maristo (The Ancient Mariner). Poemoj de Newell aperis en la kolekto Dekdu poetoj, 1934 kaj en Esperanta Antologio, 1958 (2-a eldono 1984). Du liaj noveloj, Nomado kaj Tragedio, troviĝas en 33 rakontoj, La Esperanta Novelarto, 1964. Newell mortis en Aŭstralio en 1968, 66-jara.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, septembro 2010)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/newell.html>

## El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo

### DUA PARTO - LA VIVO

78

**Tutmonde ne ekzistas io,  
kio estas pli softa kaj pli malforta ol la akvo.  
Kaj tamen, laŭ la maniero kiel ĝi atakas la duran,  
nenio supereblas ĝin.  
Ĝi ŝanĝeblas per nenio.  
Ke la mola venkas la duran,  
scias ĉiu surtere,  
sed neniu kapablas agi laŭ tio.**

**Tiel diris ankaŭ saĝulo:**

**„Tiu, kiu prenas la koton de la tero sur sin,  
estas la mastro dum ter-oferado.  
Tiu, kiu prenas la malfeliĉon de la regno sur sin,  
estas la reĝo del' mondo.“  
Veraj vortoj estas kvazaŭ malaj.**



#### Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Ĝi ŝanĝeblas per nenio.“

Pri tiu ĉi frazo, en Ĉinio la komuna kompreno estas tia, kia la traduko de Wang Chongfang:

„nenio povas ĝin anstataŭi.“

Vilhelmo:

„Ke la mola venkas la duran,“

Ĉi tie mankas frazo. Vd. de Wang Chongfang:

„ke la malforta povas venki la fortan

Kaj la mola povas venki la malmolan,“

„Tiu, kiu prenas la koton de la tero sur sin,  
estas la mastro dum ter-oferado.“

Pri „ter-oferado“: En la teksto ekzistas tiuj ĉi vortoj „she ji“ (fonetike), kiuj signifas „regno“, anstataŭ „ter-oferado“.

Kaj pri tiu frazo, eble la traduko (laŭsence) de Wang Chongfang estas pli facile komprenebla:

„Tiu, kiu portas sur si la humiliĝon de la tuta regno,  
Povas esti ĝia suvereno.“

#### Rimarko de Cezar

La tuta ĉapitro memoras min tre pri devizoj de Jesuo Kristo. Pensoj el la montprediko de Jesuo en tiu ĉapitro kvazaŭ jam estas formulitaj.


Oni scias tutmonde, ke la novplatonaj filozofoj influis la kristanisman, sed ĉu oni scias ĝenerale, ke jam Laocio esprimis nekutimajn pensojn en la maniero de Jesuo? Certe ne. Ankaŭ la verkistoj B.Traven aŭ Tolstoj post Laocio cerbumis pri tio, kiu estas efektive la reĝo de l' mondo, kaj

ankaŭ ili prezentis nekutimajn rezultojn.

(daŭrigota)

## La Kimeru - Rakonto el la estonteco (9)

-- rakonto de Erik Tantal



### Lernprogreso

Tri semajnoj!  
Irene kaj Volker preskaŭ ne plu eltenis la situacion. Tri semajnoj sen Mojo!  
„Mi pensas, ke venis la tempo por denove kontakti lin, kion vi pensas?“, demandis Volker.

„Mi havas alian ideon“. Irene havis

alian ideon. Ŝi ja agordis la smartfonon tiel, ke Mojo povas facile atingi la lernoludojn, la bildojn kaj la filmetojn. La opcion por telefonado ŝi draste blokis. La aparato nur havis unu kontakton, tiun al ŝia telefonnumero. Do, tiel ŝi povis rekte telefoni al Mojo.

Ĉu Mojo sukcese trovas la ĝustan butonon? Fakte! Mojo akceptis la alvokon. Sed li tenis la smartfonon tro proksime al sia vizaĝo. Tial Irene ne povis rekoni lin sur sia aparato. La bildon de Irene Mojo certe vidis. Irene vokis: „Saluton Mo-jo, Mo-jo, Mo-jo. Estas mi, I-re-ne!“.

Ŝajne Mojo ankaŭ ricevis tion. Sekve la ekrano de Irene nur montris kaosajn bildpartojn, kiuj terure flagris kaj ŝanĝeliĝis. Nenio estis rekonebla. Verŝajne Mojo nuntempe gaje hopis kaj dancis kun la aparato. Irene ripetis la vokon.

„Mo-jo, Mo-jo, Mo-jo. Estas mi, I-re-ne!“

Dum kelkaj minutoj nenio okazis. Volker bedaŭris, ke li ne tuj iris al la instituto por rekte observi la reagon de Mojo. En tiu momento nekredinde aŭdeblis:

„I-re-ne, I-re-ne! Kik- Kak-Kuk!“

Kio estis tio? Kiu nun respondis? Ĉu tio estis la bestozorganto? Denove ripetigis la bone komprenebla mesaĝo:

„I-re-ne, I-re-ne! Kik- Kak- Kuk!“

Tio estis Mojo. Ĉu li nun posedis la ĝustajn anatomiajn bazojn por la parolado? Ĉiuokaze, dum la pasintaj tri semajnoj li vere estis lerninta la paroladon.

Nun oni povis rekoni lian vizaĝon sur la ekrano. Evidentiĝis ke tiu eta ĉimpanzo tenis la poŝtelefonon en la ĝusta pozicio.

„Venu, ni devas esti tie. Tio ja ne eblas!“, vokis Volker kaj kune kun Irene kuris al la sekcio por primatoj.

En la baraĵo por ĉimpanzoj la bestozorganto Tim komencis disjeti vinberojn. Tiam li subite ekvidis la du kunstudentojn alvenantajn en la koridoro. „Mi longe ne vidis vin. Ĉu io okazis?“, li demandis. Volker anhelante respondis: „Jes, vi ne kredos tion. Mojo nun povas paroli!“.

Tim ne fidis siajn orelojn kaj rediris: „Vi halucinas. Tion mi ne registris. Mojo la tutan tagon ludas per la smartfono kaj mi devas vere klopodi per ĉiuj eblaj rimedoj por forpreni ĝin vespere. Jes, kelkfoje li terure kriĉas, sed tion oni ne povas nomi paroladon“. „Atendu, mi volas testi ion“, reagis Irene, proksimiĝis al la vitraĵo kaj montris ŝian smartfonon al Mojo.

Ŝi allogis lin per la vortoj: „Mo-jo, Mo-jo, mi estas I-re-ne, I-re-ne“.

Sur la ekrano de ŝia poŝtelefono aperis bildo de pomo. Tiun foton ŝi ankaŭ sendis al la aparato de Mojo, kiu tuj ekkonis ĝin. Li frapis la vitraĵon per la dekstra mano. Liaj lipoj nun ekscese ŝancelis. Kaj nun eksonis per klara prononcado „Po-mo, po-mo“. Evidente Mojo mem ekzercis la prononcadon de tiu vorto en la lastaj semajnoj. Verŝajne li estis uzanta la ludon, kiun li trovis en la aparato. Sed tio ja ne gravis. Gravis nur, ke li nun vere povis paroli. Irene poste montris aliajn bildojn: arbo, ŝtono, vinberoj. Ĉiufoje Mojo korekte elparolis tiujn vortojn.


Tim ne povis kredi tion kaj vokis: „Ni devas tuj informi profesoron Brundt, la ĉefon de nia instituto! Estas sensacio!“

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio  
(plumnomu Erik Tantal)



Se inter homoj mankas la konsent;  
 Afer' ilia estas nur turment'  
 Kaj en rezulto restas sola moko.  
 Jen Cigno, Kankro kaj Ezoko  
 Decidis pri la ŝarĝ-transport'  
 Kaj jungis sin al ĉaro en konkord'.  
 Tre streĉa estis pen', sed ĉar'- sur sama loko.  
 La ŝarĝ' por ili estus bagatel',  
 Sed Cigno strebas al ĉiel'  
 Por Kankro — dorsa ir', al akvo — tir' Ezoka.  
 Pri kulpo kaj pravec' ne estas nun deklar',  
 Sed sur la sama lok' ĝis nun senmovas ĉar'.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)  
 Ukrainio

## Du poemoj

## verkis kaj sendis Antanas Vaitkevičius el Litovio

## En lago glacie ebena

En lago glacie ebena  
 Per blonda harar' displektita  
 Feino kaptadas serenajn  
 Steletojn sur akvon ĵetitajn.

En ĉarma lunlumo sonoras  
 Dumnokte ne birda pepado,  
 Sed milde karesas la koron  
 Agrabla feina kantado.

Al l'bela feino mi irus,  
 Demandus, pro kio la kanto  
 Enhavas profundan sopiron,  
 Pri kio ŝi estas tristanta.

Subite la sunaj radioj  
 Ekbrilas sur lago ebena...  
 - Ho, kial vi, bela feino,  
 Foriĝis kun lumo matena?


## Flava

En folian flavan maron  
 Subondiĝos mi silente,  
 Postsomeran vinon drinkos  
 Mi kun la aŭtuna vento.

Pro aŭtunnebul' ebria  
 Mi ne haltos – iros, iros...  
 Kvankam la vesper' ĉi-tie,  
 Kvankam mi pri l'sun sopiros.

La brakplenon de radioj  
 Mi kunprenos, mi kunprenos,  
 En la maron de folioj  
 La ripozo dolĉa venos.

verkis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius**  
 el Litovio



## Poemo


## tradukis kaj sendis Lode Van de Velde el Belgio

Nebulo sur ŝiaj okulvitroj  
 De la ankoraŭ vaporanta teo  
 Libro en ŝia mano  
 Dum ŝi senzorge legas.  
 Kaptiĝo en ŝia spiro  
 Dum la kulmino proksimiĝas.  
 Ŝi estas surda al la mondo:  
 Nur la libron ŝi povas aŭdi.  
 Ŝi estas tute perdita nun,

Aŭ eble ĝuste ŝi troviĝas  
 En ĉi stranga papera mondo  
 Malproksima de la firma tero.

-- aŭtoro nekonata  
 -- titolo nekonata

tradukis el la angla **Lode Van de Velde** el Belgio



Franco KAFKO (Franz Kafka)

### Bruego

Mi sidas en mia ĉambro en la ĉefkomandejo de la tutloĝeja bruo. Ĉiujn pordojn mi aŭdas bati, pro ilia bruo mi evitas nur la paŝojn de la inter ili kurantoj, eĉ la klakfermon de la kuirilpordo en la kuirejo mi aŭdas. La patro trarompas la pordojn de mia ĉambro kaj tramarŝas en posttrenanta



negliĝa vesto, el la forno apudĉambra oni gratas la cindron, Valli demandas, kriante vorton post vorto tra la antaŭĉambro, ĉu la ĉapelo de la patro jam estas purigita, siblado, kiu volas esti amika al mi, eĉ laŭtigas la kriegadon de responda voĉo. La enira pordo estas malklikita kaj bruas kvazaŭ el katara gorĝo, poste malfermiĝas plue kun kantado de virina voĉo kaj poste fermiĝas per obtuza, vira puŝo, kiu aŭdiĝas plej malrespekte. La patro estas for, nun komencas la pli delikata, pli disa, pli senespera bruo, estrata de la du kanariaj voĉoj. Jam pli frue mi pensis pri tio, ĉe la kanarioj mi denove ekmemoras, ĉu mi ne malfermu la pordon ĝis eta fendo, rampu serpente en la apudan ĉambro kaj tiel surplanke petu miajan fratinojn kaj la servantinon pri silento.

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/bruego.html>

### La ujrjaldisto

Konsumita ĉiu karbo; malplena la karbujo; sensenca la ŝovelilo; malvarmspira la forno; la ĉambro plenblovita de frostoj; antaŭ la fenestroj arboj prujnrigidaj; la ĉielo, arĝenta ŝildo kontraŭ tiu, kiu volas de ĝi helpi. Mi devas havi karbon; mi ja ne rajtas frostmorti; malantaŭ mi la senkompata forno, antaŭ mi la ĉielo same; sekve de tio mi devas rajdi precize inter ili kaj en la mezo ĉe la karbvendisto serĉi helpi. Kontraŭ miaj kutimaj petoj li jam surdiĝis; mi devas al li tute detale pruvi, ke mi havas eĉ ne unu karbpolveron kaj ke pro tio li signifas por mi ĝuste la suno de l'firmamento. Mi devas veni kiel la almozulo, kiu pro malsato lasta-spire ĉe la pordosojo mortontas kaj tial la moŝtkuiristino sin decidas enbuŝigi al li la grundaĵon de la lasta kafo; tiel same la vendisto, kolere, sed sub la ĉielfulma ordono "Ne mortigu!"

devas ĵeti ŝovelilon da en la ujon.

Jam mia apero devas tion decidi; tial mi rajdas tien sur la karbujo. Estante ujrjaldisto, la manon supre ĉe la tenilo, la plej simpla bridaĵo, mi pene turnas min laŭ la ŝtuparo malsupren; sed sube mia ujo leviĝas, majeste, majeste; kameloj, sternitaj malalte sur la grundo, leviĝas, sub la bastono de la gvidanto, ne pli bele. Tra la firme frostita strateto antaŭeniĝas nia egalpaŝa troto; ofte mi estas levata ĝis la alteco de la unuaj etaĝoj; neniam mi sinkas ĝis la dompordo. Kaj eksterordinare alte mi ŝvebas antaŭ la kelovolbo de la komercisto, en kiu li profunde malsupre kaŭras kaj skribas ĉe sia tableto; por ellasi la supergrandan varmegon, li malfermis la pordon.

"Karbkomercisto!" mi vokas per voĉo kavbrulinta pro malvarmo, volvita en fumnujoj de spiro, "bonvolu, karbkomercisto, donu al mi iom da karbo. Mia ujo estas jam tiom malplena, ke mi povas rajdi sur ĝi. Estu bona. Ĝis mi povos, mi pagos."

La komercisto metas la manon oren. "Ĉu mi aŭdas bone?" demandas li trans la ŝultron al sia edzino, kiu trikas sur la fornobenko, "ĉu mi aŭdas bone? Kliento."

"Mi aŭdas nenion", diras la edzino, trankvile el-kaj enspirante super la trikiloj, agrable varmigata en la dorso.

"Ho jes", mi krias, "estas mi; malnova kliento; fidele respekta, nur en la momento senrimeda."

"Edzino", diras la komercisto, "estas, estas iu; tiom mi ja ne povas trompiĝi; devas esti malnova, tre malnova kliento, kiu scias paroli tiom al mia koro."

"Kio estas al vi, edzo?" diras la edzino kaj, por momento ripozante, premas la triklaboraĵon al la brusto, "estas neniu; la strateto malplenas; nia tuta klientaro estas prizorgita; ni povus fermi la magazeton por tagoj kaj ripozi."

"Sed mi sidas ja ĉi tie sur la ujo", mi krias, kaj sensentaj larmoj de malvarmo vualas al mi la okulojn, "bonvolu rigardi supren; vi malkovros min tuj; mi petas pri ŝovelilo da, kaj se vi donas du, vi faros min superfeliĉa. La tuta cetera klientaro ja estas jam prizorgita. Aĥ, ke mi aŭdu jam la klakadon en la ujo!"

"Mi venas", diras la komercisto kaj etkure li volas jam supreniri la kelŝtuparon, sed la edzino estas jam ĉe li, haltigas lin ĉe la brako kaj diras: "Vi restas. Se vi ne lasas vian kapricon, tiam supreniros mi. Memoru vian gravan tusadon ĉi-nokte. Sed pro komerco, kaj estu ĝi nur imagita, vi forgesas edzinon kaj infanon kaj oferas vian pulmon. Mi iras." "Sed tiam nomu al li ĉiujn



specojn, kiujn ni havas provize; la prezojn mi postkrios al vi." "Bone", diras la edzino kaj supreniras al la strateto. Kompreneble ŝi vidas min tuj.

"Sinjorino karbokomercistino", mi vokas, "humilan saluton; nur ŝovelilon da karbo; tuj tien en la ujon; mi kondukos ĝin mem hejmen; ŝovelilon da plej malbona. Mi pagos ĝin memkompreneble plene, sed ne tuj, ne tuj." Kia sono sonorila estas tiuj du vortoj "ne tuj" kaj kiom sencokonfuzo ili miksiĝas kun la vespersionado ĝuste aŭdata el la proksima preĝejturo.

"Kion do li volas havi?" krias la komercisto. "Nenion", rekrias la edzino, estas ja nenio, mi vidas nenion, mi aŭdas nenion; nur sonoras la sesa horo kaj ni fermas. Monstra estas la malvarmo; morgaŭ ni havos do verŝajne multe da laboro."

Ŝi vidas nenion kaj aŭdas nenion; sed tamen ŝi malligas la antaŭtukan bendon kaj provas min forblovi

per la antaŭtuko. Malbonŝance sukcesas. Ĉiajn avantaĝojn de bona rajdbesto mia ujo havas; rezistopovon ĝi ne havas; tro malpeza ĝi estas; virina antaŭtuko pelas ĝiajn gambojn for de la grundo.

"Maliculino!" ankoraŭ rekrias mi, dum ŝi, sin turnanta al la magazeno, duone malestime, duone kontentigite batas per la mano en la aeron, "maliculino! Pri ŝovelilo da plej malbona mi petis kaj vi ne donis ĝin al mi." Kaj dum tio mi supreniras en la regionojn de la glacimontoj kaj perdas min je neniamrevido.

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/dise.html#ujrajdisto>

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*

## La Preĝejeto

tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

**A**nkoraŭ kelkajn paŝojn kaj mi vidos ĝin, bunte kolorigita de lastaj radioj de l'ubiranta suno, kviete sidanta sur sia teraltaĵo : kelkajn paŝojn plu, atendas la okulo tiun humilan tureton, tiujn volbojn malheligitajn de tiom da pasintaj jaroj.

Unu paŝon plu por atingi la pezan pordon, kaj poste puŝi ties unuan klapegon, eniri. lomete atendi, ke la okuloj al kutimiĝu, tuŝeti en la sanktavujo. lomete paŝi, milde, sur la ŝtona planko, aŭskulti al bruoj sonorantaj sub tiu silenta volbo, sin mergi en la lumo, apenaŭ sugestita, kiel obtuze.

En tiu preĝejeto oni iras nenien, oni ĉeestas ; oni ne vizitas, oni haltas, tio estas iela respekto por la loko, tio estas maniero provi preĝi, ĉar neblas ĉi tie ne senti. Tempo, historio, kaj ia mistero, miksiĝas, la statuoj ne estas tute senmovaj, pensoj venas, kaj la vizitanto iras fronte la muron de siaj malkapabloj, je la limo foje, transigi la pordon de kompreno.

La silento estas la ombro, la flagroj de l'sakralaj kandeloj estas flustroj, ĵuroj, esperoj. Ĉiuj la manoj, kiuj bruligis tiujn flamojn, lumigis la plenan pacon, la plenan suferon de la mondo, la okuloj, kiuj ilin rigardis, vidis en ili senfinaĵojn, la koroj, kiuj akompanis ilin, eldiris ĉiujn la vortojn de l'mondo. Piede de tiu altaro milflama oni eniras en la fandujon de la tagoj, sed oni ne povas kompreni la energion – senlima – sidanta tie antaŭ oni, tiu eta parto de nekomprenebleco redonita senkonscie pere de la religio kaj amo.

La silento estas la ombro, ĉar ĉie estas vortoj, mutaj aŭ murmuretaj ; ili estis sed ili restas, metitaj sur la lumetoj kiel floretoj sur la malespero, ĉiuj oferdonaj. Koroj sindonacis ĉi tie, sen artifiko, kun granda kaj

foje kun la naivo de kulpa amaro, kiu perfidas la grandon de preĝo.

Ĉirkaŭ l'statuoj rojas aliaj vortoj, malfacilas resti sensenta antaŭ ilia ĉieesto, foje sufera, foje feliĉa. La pensoj, kiuj naskiĝis en ĉi loko estas ia olibano. La parfumo de la nevero, milde faletas sur vi, kaj vi komprenas, ke ĉio eblas, eble. Trembriloj invadas vin, pasemaj bildoj kun foraj sonoj kvazaŭ obtuzaj, spasmaj, voĉbruadoj, krioj jen el malamo jen el ĝojo. Vi ekkomprenas la sentempecon, vi ekkceptas la ekkreigon, sed vi ne scios, ĉar senutilast tio.

Se vi estas kredanto, liberigos vi viajn vortojn laŭ l'bezonoj laŭ l'emoj de l'momento. Foje malfacilas, foje malpezigas, ĉiam esencas. Se kredanto vi ne estas, vi provu konduki vian menson preter la belo, vi provu identigi tion, kio, perturbas ĉi tie ŝajnan trankvilecon ; provu ne esti inteligenta sed malfermita, akceptema.

La preĝejeto ne estas templo, ĝi estas haveno : oni kunportas elirante tion kion oni alportis, sed transformita foje transfigurita. Ĝi ne estas loko kie, oni venas peti, ĝi estas loko kien oni venas atesti, aserti, dubi. Tio ne estas loko, kien oni iras, tio estas loko kien oni reiras, forgesante la demandojn, por dueli kontraŭ la racio – minaca – por mergiĝi en la mondon de l'sakrala, fundamenta, sed konstruita sur sablo.

Vin rigardas la vitraloj, juĝas vin ili. Al la lumo ili donas formon ne por vin mirigi sed por heligi sen hojli, igi vin tiri viajn rigardojn al la ĉielo tra ili. Se via rigardo – kiu estas via lumo - revenos al vi, vi neniam plu estos la sama.



Reeliri endus nun, sed retenas vin io, tio estas via venko kontraŭ la efektiva kaj la tuja, tio donas al vi iaspecan grandon. vi ne plu deziras scii, ĉar vi perceptas, kaj la spirito ne zorgas analizi, ĝi amociiĝas, ĝi flaras sian meman parfumon.

Nokto nun falis sur la preĝejeto, kaj malheligas ĝian figuron sur griza fono ĉiela, sed oni vidas lumetojn danci tra la vitraloj. Niaj paŝoj nin distancigas de tiu loko, sed ni ne plu estas vere sole nun.

Tiom da vortojn aŭdis la preĝejeto, ke ĝi - nur ĝi - povas kompreni la verajn sekretojn, sen respondi : nur ĝi konsistigas la ejon, la azilon, de nia sincereco.

de **Claude PROUVOST**

en «Bouts de chandelles» Eld. *Flammes vives*

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

## Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

### Eterna enigmo

Eterna kaj ne enigmo dismetita  
Tiel diina kaj ankaŭ tiel malĉasta

Bela ci, kiel plenaroma floro  
Sed ankaŭ malbela, sen formo.

Ci ja konstruas vivodomon  
sed ankaŭ faligas ties ŝtonon

Ci estas feliĉo kaj ĝojo  
sed ankaŭ malĝojo, detruo.

Mi portas pacon, kvieton,  
sed ankaŭ militon, malkvieton

Ci estas honoro kaj revo  
Sed ankaŭ honto kaj infero

Ci estas kuracilo por ĉiu vundo  
Sed ankaŭ ci brogas kiel veneno

Ci estas plibeliganta la vivon anĝelo  
Sed ankaŭ impertinenta diablo

Ho, ci estas miraklo de ĉi tiu mondo  
sed ankaŭ plej granda malbono

Ne ekzistas pli fascina ol ci mem floro  
Sed ankaŭ gxermita harbruliga urtiko

Ci estas ja ebriiga parfumo  
Sed ankaŭ plej malpura sterko

Ci estas pli intima amiko  
Sed ankaŭ plej fia malamiko

Ci estas plej profunda amo  
Sed ankaŭ plej nigra malamo

Ci estas plej fatala sekreto  
Kaj samtempe ĉiutaga banalaĵo

Ci estas dorlotanta karesado  
Kaj plej pereiga turmentado

Ci estas freŝiga venteto de aprilo  
Kaj samtempe blovego de spirito

Ci estas plej alta adorado  
Kaj plej maldigna humilado

Ci estas pura montara akvofonto  
Kaj samtempe senmova marĉa ŝlimejo

Ci estas ja Dia benito  
Kaj same trifoje malbenito

Neniu allogas min ol cia muziko  
Kaj ci estas ekskorita de lado bruo

Ci estas sanktulino kiu dresas eĉ bestion  
Sed ankaŭ plej ordinaran prostituinon


Nur ĉe vi brilas kiel oro la virto  
Sed ankaŭ kroĉanta koron malvirto

Kara, respektita kiel ĉiu reĝino  
Sed ankaŭ al la vivo servutulino

Kiu estaĵo donas varmon kiel ci  
Sed ĉu malvarmon kaj froston portas ci?!

Nenio kiel ci nian animon skuas  
Kaj nenio kiel ci nin enuigas

Kiel alie estus, ĉar edzan Genon ci heredis?!  
Ĉar Dio, virino, cin el ties ripo ja kreis.



*Lushnjë, oktobro 1985*

Se ni marŝus je rapideco 10 km/horo ni atingus la difinitan lokon je horo 13:00;  
se ni marŝus je rapideco 15 km/horo, ni atingus la lokon je horo 11: 00;  
kaj se ni marŝus je rapideco  $x$  km/horo ni atingus la lokon je horo 12:00.  
Trovu " $x$ "!

**Solvo:**

Ni devas marŝi je rapideco 12 km/horo.  
  
Ni notu la distancon per L.  
Tiam  $L/10 = L/15 + 2$  de kie  $L = 60$  km.  
La starto okazis je horo 7:00, ĝis 12:00, estas 5 horoj.  
Do  $60:5 = 12$  km/horo



Astrologio kontraŭ Psikologio - Februaro / Akvistoj



Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la naskitoj sub la signo de Akvisto

**Korpo kaj sano**

La virino "Akvisto" havas ovalan vizaĝon, kun altaj elstaraj vangostoj, frunto kun mallarĝaj tempioj.

Ŝi devas kalkuli kun sia nervozeco kaj vidas sin konstante "persekutita". Ĉar ŝi estas cetere decide nekonformisma kaj iom ekstravagance, ŝi estas ofte rigardata kiel "mildan frenezuleton", viktimo de la nekomprenemo de la aliuloj. Ŝi bezonas trankvilon, kaj fûgi el fortaj emocioj kaj ĉio kiu povas fortigi ŝian emon al superekcitiĝo.

Ĉar ŝi ne havas tre solidan sanon, ŝi devas domaĝi siajn fortojn, kaj ŝi bezonas dormon.

**Kiel ŝi reagas ?**

Samtempe kredema, inteligenta kaj infaneca, kapricema kaj obstina, malavara kaj agresema, havante noblanimecon kaj etmensecon, kapabla je abruptaj impulsoj, sindonema, kiam ŝi ne estas egoisma, defendante ideojn pri justico dum kapabla fari maljustaĵojn, esprimante kun kuraĝo siajn opiniojn, sed lasas sin mergata per tiuj de la aliaj, pasia kun manioj, pigra kaj kapabla, metodema kaj bohemiisma.



**Je kio ŝi taŭgas ?**

Ŝi povas sukcesi, se ŝi elspezas konsekvencecon, ĉar ŝi devas malfidi sian dissemitecon kaj la flankon iom ŝanĝiĝeman de sia naturo. Tial ŝi bezonas skipan laboron, kiu stimulas ŝin, ŝi ŝatos ĉefe profesion, kiu rilatigos ŝin kun la aliuloj.

Ŝi ne hezitas reklami sian rajtigitaĵojn, fronti kontraŭ eĉ grava persono, ajna estu ĝi !

Ŝia vera ambicio estas precipe konservi la tempon ĝui la vivon kaj eskapi al ĉiaj sklavecoj..

**Kiel ŝi amas ?**

Foje ŝi daŭras geedzece kun viro, kiu ŝi ĉesis deziri, sed kiun ŝi kompatas, kaj kredas sin al li utila, - kaj ŝia jes estas - kaj kies amikino ŝi provas esti. Sed ŝi supertedas lin (kaj ĉiujn siajn amikoj cetere!) per sia senĉesa kaj torenta babilado, kio estas ŝia maniero reagi al angoro per ekcitiĝo, agademo kaj superverŝo da paroloj.

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio





*Evi el Halle/  
Saale, Paŝtelo  
sur flava velura  
papero, 1988*



Ŝiaj alten pufigitaj haroj etendiĝis trans ĝis antaŭ la nigre ŝminkitajn brunajn okulojn. Kviete ŝi pozis por mi. Ŝi portis ĉenon kun kruco aspektis trista kaj serioza. La nigrajn vestojn mi sole skizis alude.

Subite malfermiĝis la pordo kaj ensvarmis ŝiaj geamikoj. Estis enigma enigmo por mi, kielmaniere ili eltrovis nian lokon. Simple mi petis ilin esti tre mallaŭtaj - pro la mastrino. Ili grupigis sin ĉirkaŭ la litojn. La origine blanka kaj hela ĉambro nun aspektis nigre kaj obscure obskure.

Ili ŝerco provoketis iomete la pozantan Evi. Ŝi diris ĉagrenite: "Eeiii!" - kaj ties tiun malaproban trajton ĉirkaŭ ŝiaj buŝo kaj okuloj mi devis nepre kapti por la portreto!!

Ŝi portis krucon je ŝia kolĉeno. La nigrajn vestojn mi nur aludis.

Postparolo

La paŝtela bildo ne estas fiksita. Pro malbonaj spertoj mi principe rezignas pri jena tiu teknika paŝo. La fiksado tro ŝanĝas la farbvalorojn de la paŝtelo kaj la delikaton, gracilon de la kretoj. Lumoj altigitaj per blanka koloro tute perdiĝas tiele ke subite aperas tute alia persono.

Plej ofte mi metas la desegnaĵon inter glatajn silkecajn paperojn, en kazo de neceso mi protektas ĝin per pura folio aŭ gazeta papero. Se mi povas ebligi eblas, mi metas la desegnaĵon sub vitron kune kun paspartuo kaj konvena kadro. La paŝtelo de Evi jam perdis iomete da kreto pro ekspozicioj kaj pro tio ĝi fariĝis pli delikata.

Kaj mia modelo Evi - kiel ŝi vivas hodiaŭ? Mi tre volonte eksciis, kiel ŝi estis evoluiginta progresis, kiel ŝi fartas hodiaŭ. Post ŝi mi desegnis ankoraŭ tri pliajn gotikojn laŭmodele. Ili vizitis min, rakontis pri si mem kaj skribis eĉ afablajn leterojn. Iam ajn ankaŭ ili mem estis havantaj ekhavintaj familiojn kaj forlasis la gotikan fazon.

Sendis **Helga Plötner** el Germanio

**D**um studsemajno dediĉita al pentrado sub libera ĉielo, mi troviĝis kun miaj studkolegoj en Halle ĉe Saale. Ni loĝis en pensiono proksime de l'centra Ffoira placo.

Jen, en sur la foirejo tiu placo mi vidis kelkajn gejunulojn kun plumecaj hararoj strange vestitaj kaj portantaj nigrajn, longajn vestaĵojn. Ili nomigis sin gotikoj (germane: Grufties, angle: Gothics). Afable mi alparolis ilin kaj demandis, ĉu mi rajtus pentri iun el ilin. Unu knabino tuj deklaris sin preta. Mi kunvenigis ŝin al mia ĉambro en la proksima pensiono; tie mi estus havinta havis trankvilon, krajonojn kaj desegnopaperon. Alia afero estis, ke mi ne certis, ĉu la mastrino estus interkonsenta konsentus pri mia ago, se ŝi sciis pri tio ĝi. Do mi petis la knabinon esti softa silenta, kaj mi unue enrigardis timeme la koridoron. Tiam ni glitis rapidege kaj singardeme en la ĉambron.

La du ekzistantaj seĝoj sufiĉis por sidigi nin ke ni povu sidiĝi vid-al-vid. Mi spertis eksciis, ke la knabino nomiĝas Evi kaj ke ŝia grupo ŝatas viziti tombejojn por travivi tie certan tempon pasigi tempon sur tombejoj..

Min havis intereson interesis ekscii pli pri ŝia vivo, ŝia familio, ŝiaj psiko kaj motivoj, kaj scivoleme mi studis ŝin.

Por krei kontraston al la nigro mi elektis flavruĝetan folion palpebran kvazaŭ veluro kaj mi uzis miajn paŝtelajn kretojn de la firmao Koh-i-Noor. kaj krome. Pro ĝia palpebla moleco kaj ĝia malhela, varma, koloro de kareo ĝi donis bonan kontraston al la vestaĵo de la knabino.

Mi konas *vin*, malriĉan kaj senvivan  
 Kaj via lum' arĝenta  
 Estas al vi pruntita ja de *potenculo*;  
 Vi ne plu trompas min  
 Ĉar nun mi bone konas ne plu  
 naĝantan en la fantazia lumo ;  
 sed kiam mi vidas vin supre, ho plenluno,  
 beligi la ĉielon dum somera nokt-ebrio,  
 mi forgesas, kion mi rakontis al vi antaŭe  
 kaj mia koro repleniĝas per poezio.

Rena Balzan<sup>1</sup>


tradukita el la malta de **Carmel Mallia**



<sup>1</sup> *Malta poeto kaj romanisto; iuj el ŝiaj poemoj estis tradukitaj en la anglan, francan, italan kaj germanan lingvojn, kaj iuj el ŝiaj romanoj en la anglan. Ŝi publikigis diversajn sciencajn eseojn; studis genetikon en diversaj universitatoj kaj doktoriĝis ankaŭ en diversaj universitatoj. Profesoro pri genetika biologio ĉe la malta universitato.*

## Hajkoj

## verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

Fino de l'nokto. La horloĝo mezuras mian solecon.	Senluna nokto ie plorĝemas gitar' Soleca seĝo.	Aŭtuno! Pluvas! La birdoj flugas suden. Sonas l'lernejo.	La stelo montras padon al mia domo. Tristas mi sola!
Kiom da aŭtunoj signas kalendaro...Mi ne forgesas vin	Kato soleca ĉe la sojlo tremeĝas. La domo mutas.	Sur juglandarboj la kornikoj rondflugas. La vintro longa.	 <p>verkis kaj sendis <b>Ivaniĉka Maĝarova</b> el Bulgario</p>
Malvarmetiĝas! La krizantemoj velkas. Dolĉa estas te'.	Timema cervin' trans la padoj forkuras. L' ĉasistoj gvatas.	Renversis l'nokto en la fajran matenon. La tago ekpaŝis	
Ĉambro.Piano. La klavoj ekŝtormegas. Matena kafo.	Pulm' de kolombo alflugis. Ĉu estas am' aŭ disiĝ' estas.	L'bordo dezertas Nur la ondo tenere kisas la sablon.	

## Mia korespondanto Yda Wei (Veĵdo)

## verkis kaj sendis Elena Popova, el Bulgario

**M**i konas lin antaŭ nelonge, de mia partopreno en la revueto *Penseo*. La revueto estis honorita de Premio Grabowski 1994.

Mi komprenis, ke li estas eldonisto, poeto, tradukisto.

- Dum septembro 2016 j. vi skribis poemeton "Gloraj tricentaŝoj omaĝe al la 300-a numero de *Penseo*". Tie vi diris:

*Penseo pasintaj en parado  
 nin alvokas al iro progressa  
 plue al labor' por E- kultur'.*

Decembre 2020 eliris numro 350.

**Kio nun vi volas bondeziri al viaj legantoj ?**

- *Penseo* estas bona ĝardeno por esperantistoj publikigi siajn poemojn kaj eseojn. Mi estas ĝia ĉefredaktoro dum 20 jaroj. Ĝi eldoniĝas regule ĉiumonate. Kiel redaktoro mi kuraĝigas legantojn kaj aliajn esperantistojn praktiki sian Internacian Lingvon por Esperanto-literaturo

- En 2019 mi gajnis "honoran mencion" en Belarta Konkurso de UEA en la branĉo de poezio per poemo "Knabo dum rifuĝado", kiu priskribas la aventuron de knabo rifuĝanta al Eŭropo.

**- Mi komprenas, ke kiel tradukisto vi tradukas prefere poemojn de iamaj ĉinaj poetoj,**



**esperantiĝas poemojn, kantojn, romanojn. Mi legis, ke vi tradukis perfekte la romanon "La familio" de Bakin. Mi petas vin, skribu pli.**



en la branĉo de poezio per poemo "Knabo dum rifuĝado", kiu priskribas la aventuron de knabo rifuĝanta al Eŭropo.

- Jes, mi estas tradukisto. Mi tradukis la romanon La familio verkitan de la ĉina fama verkisto Bakin (1990) kaj la romanon Sieĝata fortikaĵo verkitan de la ĉina fama verkisto Qian Zhongshu (2018). Kaj mi ankaŭ elĉinigis poemarojn: 300 ci-poemoj de la Song-dinastio en Esperanto kaj la ĉina (2020), 300 poemoj de la Tang-dinastio en Esperanto kaj la ĉina (kuntradukita, 2020) kaj 300 kantpoemoj de la Yuan-dinastio en Esperanto kaj la ĉina (kuntradukita, eldonota, 2021).

**Mi deziras al Vejdo sanon kaj fortojn en lia vivo kaj ŝatata laboro!**

**Vejdo estas poeto. Li preferas la humoron, kiel mi komprenas. Kiel poeto Vejdo ricevis premion en Belarta Konkurso de UEA en la branĉo de poezio 2019.**

- En 2019 mi gajnis "honoran mencion" en Belarta Konkurso de UEA



### La Sorto (EKRA2020)

Katenis antro korpa la spiriton,  
Cikatro tomba poreterne restis,  
Kaj nigra ĉi mantilo-memlerninto  
Vesperon al la nokto alivestis.

Nomadoj profundigis almiliton,  
La maroj ŝiposplitojn plu digestis.  
De jarcentar' kolosis la sofito,  
Publike sian volon manifestis.

Per lumo Krono kronis konstruaĵon –  
Rimarkis iu el subgrundetaĝo.  
Aŭ eble nur aspiris mi esperi...

Kaj koluziis ĉiuj mondaj pontoj,  
Ja koluziis ĉiuj grandaj fortoj,  
La sorto loterii ne toleris.

**Espopore**

konkurso de **Evgenij Georgiev**  
el Karaganda, Kazahio  
speciala premio pri poezio en EKRA 2020  
EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abritus"

### La Muelilo (EKRA2020)

Muelis jarojn granda muelilo,  
Tempiojn makuladis per faruno.  
Fratinoj Pasintec', Futur' kaj Nuno  
Fadenon ŝpinis el senforma vilo.

Kaj la animon milde tuŝis brilo,  
Kaj kaptis iu sian oportunon,  
Vicfoje trafis celon amharpuno;  
Viktimon tiris sur la ŝnur' aprilo.

Vi vidis: ĉio tio ne hazardis,  
La korojn krudaj provoj vere hardis.  
Sed kio nun? Vi staras apud limo...

Kaj por deserto estas mort' dezerta.  
Ho, mutu vi, kriema turpa timo!  
Ĉion aranĝos mondoordo sperta.

**Espopore**

konkurso de **Evgenij Georgiev**  
el Karaganda, Kazahio  
speciala premio pri poezio en EKRA 2020  
EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abritus"

## (kvara parto)

**K**omenciĝis Aŭgusto. La vetero ankoraŭ belas kun pli da sunaj tagoj. Sur ĉielo brodas blankaj nubetoj diverdformaj. Angule de via okulrigardo videblas nubeto korforma. Antaŭ viaj okuloj troviĝas densa kolekto de neĝoblankaj nubetoj. Tre similas al ŝaumkremo. La videbla ĉielo super nia urbo lazuras.

Tagiĝo senventa.

Sunaj radioj rapide etendas siajn varmajn brakojn varmigante la teron. La ekstera temperaturo rapide altiĝas.

En la domkorto de Petraj gepatroj estis tre vigle ekde frua mateno. La gepatroj de Petro estis okupitaj purigante la domkelon. Pro tio en la korto estis elĵetitaj malnovaj seĝoj, malnova dometo por bestoj, jen, videblas iomete disŝirita kuseno, malnovaj iloj kaj diversaj ujoj kaj multaj aliaj objektoj.

Petro kaj Jana sidis komforte babilantaj kiam la patro de Petro diris:

– Petro, ĉu vi havas amikojn en proksima arbaro. Vidu, filo, kial vi ne transdonu ĉi tiujn dometojn al ili. Ja, somero rapide pasas kaj venos pli malvarmaj veteroj. Kion vi diras rilate al tio - demandis la patro, rigardante ilin scivole.

– Jes, paĉjo, bonega ideo. Ĉu ne Jano? Petro kun nekaŝita ĝojo turnis sin al Jana.

Jana staris silenta momente poste ekkuris en la brakumon de la patro de Petro.

– Dankon, bela ideo paĉjo... Mi intencis diri ke ni morgaŭ kunportos iom da nutraĵo por birdoj, same por hundoj kaj por katoj. Mi aĉetos ĉion en la Besto Petola-butiko - respondis Jana frapante la manon sur la tableto troviĝanta apud ŝi.

– Jes, Jana. Kia bela ideo. Ni refarbigu la malnovajn dometojn. Kiel ni surprizigu niajn amikojn.

La patrino de Petro staris apude rigardante kiom Petro kaj Jana estis feliĉaj.

– Mi helpas vin - ŝi diris.

– Ja mi donos al vi farbojn kaj ni kune refreŝigos la dometojn Eĉ tiun kusenon - ŝi montris al tiu direkto aldonante - jes, ĝuste tiun, troviĝanta meze de la domkorto. Vi povos forpreni ĝin por viaj amikoj. Mi rekudros ĝin. Estu ĝi kiel nova - finis ŝi sian paroladon.

Dirite farite.

Post iom da tempo de diligenta laboro rezultaj aperis. Antaŭ ili staris du belaj dometoj. Unu por hundo kaj la alia por birdoj. La jupo de Jana kaj pantalonoj de Petro estis malpurigitaj farbe tamen ili estis feliĉaj.

– Estas bone, ke panjo donis al ni tiun gantojn alie niaj manoj estu farbitaj samkiel niaj vestoj – diris ŝerce Petro.

Ili ĉikanis unu la alian sed neniu estis ofendita.

– Morgaŭ posttagmeze, je la sesa kaj duono, ni forprenos la dometojn al niaj amikoj. Kiom multe ili estu surprizitaj - diris gaje Petro.

– Ni revidos nin posttagmeze. Ĉu bone? - diris Petro salutante ŝin.

Mateniĝis suna bela tago. Jana gaje kuretis tien alien. Ŝia vizaĝo ruĝiĝis dum bluaj okuloj ridis feliĉe. Ŝi preparis ĉion tamen ŝi rekontrolis ĉion dekfoje zorgema ke ion ne forgesu.

Posttagmeze je la sesa kaj duono Jana senpacience atendis Petron. Ekvidinte lin, ŝi svingante per blanka tuto, ekkriis:

– Petro, ja hastu. Niaj amikoj atendas nin. Ni malfruiĝos - diris ŝi zorgemvoĉe.

Petro fiere ekpaŝis kriante:

– Nu, venu vi ĉi tien, la patro venas por stiri nin arbaren aŭte. Li vole helpas nin.

Nun, ili ĉiuj estis kontentaj. La patro ĉar li ekvidos kiel lia kara filo pasigas tempon, Petro kaj Jana ĉar ili venos ĝustatempe ĉe siaj amikoj.

Sed ne ĉio estas laŭ nia deziro. Kvazaŭ Diablo enplektigis siajn manojn.

La aŭto ne moviĝis.

– Kio okazas nun? - demandis sin la patro. La infanoj estis mire silentaj – Mi devos alvoki iun por ekzameni la aŭton – diris li post kvinminuta paŭzo.

– Ja, certe malŝanĝitaj baterioj... ja malestas elektriĉo. Eble devas plenigi la akumulatoron - grumblis la patro maltrankvile.


La infanoj staris malgaje apud la aŭto. Tiam iu fajfis al ili. Ĉiuj turniĝis al la direkto de la sono. Granda rido ekaperis en la lipoj de Petro. Li ekkuris en la brakumon de maljunulo stiranta la provizoran biciklon, havanta la grandan korbon, troviĝanta malantaŭe sed firme ligita por la stiranta biciklo.

Ĉu mi devas priskribi al vi kio okazis poste. Jes, Vi bone divenas :

La patro metis ĉion flanken el la aŭto poste facile enmetis ĉion en la korbon. Apogante kaj puŝante la biciklon kune kun la maljunulo ili sukcese atingis la arbarrandon. Tie jam senpacience atendis ilin la amikaro.

Aŭguste la vetero plibeliĝas. Ŝajnas ke daŭras someraj varmaj tagoj. Tamen la tagoj iomete mallongiĝas.

– Kiaj belaj dometoj – unuvoĉe kriis la amikoj.



– Jana kaj mi, volis vin surprizigi, diris Petro fiere. Vidu kiom da nutraĵo Jana donis por vi. Ni kune farbis viajn novajn dometojn

– Niaj dometoj – ekkris la hundo kaj duone blankmakulita kato. Ĉiuj ekridis.

– Kara Kato, vi travivos vintron ĉe mia domo, kun mia domkato, kaj tiu dometo estas por birdetoj de la tuta arbaro. Por vi kaj por birdetoj kaj por nia saĝa hundo estos la manĝaĵo -diris ride Petro donacante la birdosemojn kaj aliajn manĝaĵojn al la amikoj.

– Ho, nun speciala donaco por la hundo – jen hundo kara, ostoiloj por viaj dentoj – diris Jana malferminte ŝian manplaton montrante la ostojn.

– Ankoraŭ unu surprizo - diris Petro kun sekreta vizaĝmieno dum ili scivole rigardis kio estas tio, kion Petro kaŝas malantaŭ lia dorso.

Petro venas malrapide alportante du belajn floropotojn direktante al la papilioj

– Jen floroj por niaj karaj papilioj. Mi metu ilin apud la dometoj. Enorde amikoj?

– Jes - ĉiuj gaje respondis. Birdoj ekpepis, la

kontentaj hundo kaj kato brue fojfoje eniradis en la dometojn dum la papilioj flugadis ĉirkaŭ la floretojn .

Tiam alflugis al ili nealvokita lampiro .

– Ho kia gaja amikaro. Ĉu vi akceptos min en via amika grupo - demandis ilin Lampiro.

– Vi jam estis akceptita - diris Jana. Vi havas la propran lumigilon. Tial Vi estu nia estonta horloĝo. Kiam vi alflugos al ni ni scios, ke estas tempo por disiĝi .

– Ke estas tempo por reveni hejmen, por ke niaj gepatroj ne estu zorgemaj - kapjesante diris Petro.

Ĉiuj ride salutis unu la alian kaj promesis la baldaŭan renkontiĝon.

– Ĝis revido karaj amikoj! – salutis ilin kontente Jana kaj Petro.

– ĜIS REVIDO! eĥis arbaren en la varma aŭgusta vespero.

(Fino de la kvara parto)

## Ĉesu vi

**M**ia amiko Paŭlo trovis en la poŝtkesto leteron, en kiu estis pentrita la kranio kaj skribita ununura vorto "ĉesu".

Paŭlo komprenis kion signifas la kranio, sed neniel povis percepti la signifon de la vorto. "Mi estas nek juĝisto, nek konsilisto", - ĝemis li. – "Mi estas simpla, plej trankvila homo, eĉ kulon mi ne tuŝas...". Kaj vere, kiam sur nazon lian eksidis tiu "besto", mia amiko nur ekblovus kaj tuj en lia animo iĝis serene. "Verŝajne iu ekŝercis," - decidis Paŭlo kaj ne plu pensis pri tio, trankvile laboris en oficejo kaj nokte dormis senŝone.

Tamen sekvamaten li trovis ĝuste tian saman leteron. "Kion mi ĉesu?– pensis Paŭlo. – "Ĉar mi faras nenion". La maltrankviliĝo ne forlasis lin dum la tuta tago. Per ĉiuj fortoj li skuis sian memoron – de tie falis titoloj, kostoj kaj televida reklamo, tamen trovis nenion seriozan. "Kiu kaj pro kio minacas al mi ?" - miris Paŭlo.

Nokte li dormis malbone kaj matene, malfermante poŝtkeston, tremis liaj manoj. En poŝtkesto kuŝis tia sama letero, nur literoj tiu ĉifoje estis ruĝaj kaj kranio – pli granda. "Necesas turni sin al polickomisarejo" – decidis mia amiko. Tamen kiam aliris li polickomisarejon, lia kuraĝo forvapiĝis. "Kion mi diros al ili? Se mi estus senviva, la afero estus alia, kaj nun?... Oni eĉ povas min bati per la gumita bastono..."

Returniĝis li kaj piediris al laborejo ĉirkaŭvoje. La laboro tiutage al li ne sukcesis. "Se mi scius kion,

## humuraĵo de Laimundas Abromas el Litovio

certe mi ĉesus," - suferis li. "Ĉar mi estas nek patrioto, nek idioto. Vi nur diru al mi kion, kaj mi tuj...sed kiel mi ĉesu nun? Ne, sinjoroj, tiel vi ne profitos."

Vespere perdiĝis lia apetito, komenciĝis la tintego en oreloj kaj nokte entute li ne fermis okulojn. Sed matene – kiom da ĝojo! La poŝtkesto estis malplena.

La malhela aŭtuna tago sereniĝis per la ĉielarko, en lia laborejo ŝajne sonis la sonoriloj, ree aperis apetito kaj vespere li kun plezuro eksidis ĉe la tablon. Ĝuste tiam eksonis telefono.

– Ni je avertis vin,- diris tute agrabla voĉo. – Ĉu jes ? – al mia amiko sekiĝis la gorĝo.

– Kiu parolas? – ekkriis li.

– Ĉesu vi – diris la basvoĉo.

– Mi tuj... bonvolu... – ekdiris Paŭlo – Tamen kion mi ĉesu?

– Ĉesu vi esperantumi – respondis oni.

– Jen ..., – ekis Paŭlo timigita – tamen en alia flanko la aŭskultilo estis metita. Mia amiko elŝaltis la televidilon, estingis la lumon kaj enlitiĝis. Li sin turnadis kaj suspiradis, sed pensis nenion. Anstataŭ la pensoj en lia kapo nestis iaj absurdaj vezikoj. Nur antaŭmatene li ekdormis kaj ellitiĝis malplifruo ol kutime. Rapide glutis li iom da kiselo, mordis iom da kolbaso kaj tiam eksonis telefono.

– Ĉesu vi – diris tiu sama basvoĉo, nur ĉifoje per la metala resonado.

Trans la fenestro varmigis suno, surstrate ĉirpis



paseroj kaj Paŭlo sentis sin pli kuraĝa ol hieraŭ.

– Kion signifas tio? – demandis Paŭlo. – Ĉu mi ne rajtas legi, skribi? Ĉu mi ne rajtas komputili, renkontiĝi kun samideanoj? – kaj iel strange ekridetis.

– Ĝuste tiel, – respondis la baso kaj klarigis al iu ŝajne staranta apude – Mi diris, ke li komprenas ĉion, tamen speciale...

– Sed kio okazos, se mi ne ĉesos esperantumi? – rediris Paŭlo.

– Demandu Salomonon, – responde sonis en la telefono.

– Kiun Salomonon! – ekkriis Paŭlo, tamen transe jam aŭdiĝis la interrompa sono.

– Mi konis nur unu Salomonon, sed tiu antaŭ tri monatoj... – cerbumis Paŭlo. Subite lin surverŝis ŝvito. – Do... Salomono ankaŭ estis esperantisto... – decidis Paŭlo. – Jes, Salomono mortis iel strange.

Nun Paŭlo ne dubis, necesas informi policon... Li montris al la polickomisaro la tri leterojn kaj rakontis tutan historion.

La komisaro sulkis frunton, poste demandis, kie kaj kion li laboras.

– Eble anstataŭ labori, vi esperantumas? – ekinteresiĝis la komisaro.

– Ne! – respondis Paŭlo. – Fine la afero estas persone mia. Mi esperantumas dum libera tempo.

– Tutegale vi pripensu, – proponis la komisaro. – Kiu profitus de tio, se vi ĉesos esperantumi?

– Neniu, – respondis Paŭlo, – Edzinon mi ne havas.

– Tiam iru hejmen kaj timu neniun.

Paŭlo ekrigardis trans la fenestron. Proksimiĝis la krepusko. La komisaro redonis al Paŭlo la leterojn kaj diris havante pli gravajn aferojn.

– Tamen Salomonon ili mortigis, – diris Paŭlo. – Kvankam pacienca homo li estis, malnova esperantisto. Pensiulo. Li sidis ĉe la tablo, skribis kaj ne atendite... Koro – tiel diris la kuracistoj. Tamen kredi ilin oni ne povas.

– La pensiuloj ĉiam tiel..., – rediris komisaro kaj rekomendis al Paŭlo iri hejmen.

– Mi nenien iros! – ekkriis Paŭlo – Vi arestu min aŭ donu la gardiston!

Tiam la komisaro malfermis pordon kaj forpelis Paŭlon surstraten. Reveninte hejmen Paŭlo trinkis du litrojn da akvo kaj enlitiĝis. Matene post la matenmanĝo Paŭlo vizitis la prezidanton de Esperanto klubo kaj ĉion rakontis.

– Mi pensas, ke la polico kunagas kun ili – finis Paŭlo. – Kion mi faru?

Kluba prezidanto metis manon sur la ŝultron de Paŭlo kaj konsilis:

– Ne ĉesu, – li diris. – Ne indas subiĝi al premado. Se ili ekvidos, ke vi timas, ili impertinentiĝos ĝisfunde.

La konsolaj vortoj al Paŭlo ĉimomente ege necesis. Li ĉirkaŭbrakis kluban prezidanton kaj ekploris.

– Ĉu pri tia vivofino ni esperis? – demandis Paŭlo.

– Tutegale kiom aktiva vi estos, kiom forta, ĉu vi sole sukcesos kontraŭstari? Se niaj samideanoj aktivu amase, multnombre... kaj nun... – rediris la klubestro.

– Mi ne kapitulacos!, – montris dentojn Paŭlo. – Jes, inter ni, esperantistoj, mankas unueco... Tamen se ĉiuj el inter ni serioze esperantumu... – bedaŭris li.

Veninte hejmen, Paŭlo ŝirmis fenestron, eksidis ĉe la tablon kaj komencis...

Li verkis multe kaj longe, fojfoje ekkantante: "... kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj, nek battoj de l' sorto, nek moko de l' homoj.... " – po unu, po du strofojn, kiom memoris.

Neniu telefonis. Li ripozis bonege, kaj matene ĉiuj strangaj okazintaĵoj ŝajnis al li kiel sonĝo. Li forŝirmis fenestron – surstrate hele lumis la suno – kaj eksidis ĉe la tablon por matenmanĝi. Li manĝis multe, ĉar neniu ĝenis. "Ili vidas, ke mi ne timas ilin – pro tio ĉesis. Ĉar ili mem estas timuloj" – pensis Paŭlo. Sed kiam venis tempo por iri al oficejo, Paŭlo eksentis, ke tremas liaj manoj kaj la koro forte batas. Li ne kuraĝis malfermi pordon: "eble tie trans la pordo oni jam atendas min?" Finfine Paŭlo metis enpoŝen la tranĉilon kaj ekpaŝis. Neniu atendis lin, tamen Paŭlo ne dubis, ke ĉio finiĝos ĝuste hodiaŭ... Li estis jam apud la oficejo, kiam surveturis lin la ŝarĝaŭto. Kaj neniu eksciis, ĉu tio estis malfeliĉa akcidento, aŭ intenca hommurdigo.

Kiam mi rakontis tiun historion al la klubanoj, tiuj nur rediris: "La vivo de esperantistoj estas danĝera...".

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

**"P**anjo – ĉu mi ricevos do morgaŭ ĝustan vivantan katon?"

Jam ofte la malgranda Annemarie estas demandinta tion al ŝia patrino. Kaj morgaŭ Annemarie havos naskiĝtagon! Ĉu eble ĉi-foje ŝia plejgranda deziro finfine estas plenumigota?

La patrino enigme ridetas.

„Ĉi-foje vi ricevos tute apartan katon, mia karulineto, do, atendu nur!“

La atendado estas malfacila. Annemarie sidas en ŝia ĉambro kaj vidas al multkolora galerio de pluŝaj bestoj, kiuj sidas sur la litorando al la muro.

Preskaŭ ĉiuj estas katoj. Grandaj kaj malgrandaj, ruĝaj, nigraj, tigrofelataj, blankaj, flikpecataj, ĉiuj eblaj koloroj ĉeestas, ankaŭ tiuj, kiujn oni neniam vidas al ĝustaj vivantaj katoj: rozkolora, flava, oranĝa, blua, verdega ...

Aĥ – ĉiam denove ŝi ricevas de ĉiuj tian katon, egale ĉu estas naskiĝtago, kristnasko, do, eĉ dum pasko ie estas kaŝita pluŝa kato.

– Vi amegas katojn, mia infaneto, do, tion ni scias ...

Se estus unufoje inter tiuj ĝusta vivanta kato! Ŝiaj amikinoj, ŝiaj lernejoj kamaradoj, preskaŭ ĉiu el ili havas ĝustan vivantan katon! Ekzistas Sissi, Franzel, la Lucy kaj la Schnurzel, Schnupsi, Cosima, Fiona, Murakl, la rabisto Hotzenplotz, la Schlemihl, Dule, Erni, sinjoro Schmitt, Pascha kaj eĉ Neĝulino! ...

Plejvolonte Annemarie deziras virkaton. Nigran katon kun blankaj piedetoj kaj blanka salivtuketo. Kaj li devas nomiĝi Pronto! Tiu signifas „rapide“ aŭ „prompte“. Ŝi scias tion el la lastaj ferioj, kiam ili estis en Italio, kaj tie ĉiam oni diris: Pronto, pronto! ... Ŝia Pronto estus la plejrapida kaj la plejgaja kato de ĉiuj!

Annemarie prenis ankaŭ alian katon, se oni ne ricevos Pronton. Ĉefe – ĝusta vivanta kato! Sed ĉiam la patrino diras: se vi estos granda, vi povos ricevi vivantan katon. Nuntempe vi ankoraŭ estas tro malgranda. Kiu devos prizorgi la beston? Mi devas labori, via patro ankaŭ. La kato devas esti nutrata, oni devas purigi la katnecesejon, al la bestokuracisto ĝi devas iri, ĝi suprensaltas ĉien, kaj allekas ĉion, ĝi ĉion malsuprenĵetas! Kiu do devos ĉion reordigi? Por tio vi ankoraŭ estas tro malgranda!

– Verŝajne la patrino ne ŝatas katojn! Kaj la patro? Ne – tiu ankaŭ ne donacos katon al ŝi. Li faras tion, kion la patrino diras.

Annemarie ne sentiĝas tro malgrande. Kaj morgaŭ – ŝi aĝos jam Naŭ!

– Do, kion la panjo diris? Tute aparta kato?! ...

Annemarie sidiĝas apud la pluŝkatoj sur la lito kaj

prenas ilin, unu post la alia, sur sian sinon. Ŝi mankaresas ilin, skuas ilin, premas ilin al sia koro. Kelkaj klakas per la okuloj, kelkaj miaŭas, se oni premas sur siajn ventrojn. Kelkaj estas tre facilmovaj kaj kelkaj estas plenumigataj je grajnoj, kiuj iomete grinças. Sed ĉiu estas kiel la alia – tuj se oni delasas ilin, ili estas silentaj kaj restas kuŝantaj tie, kie oni metas ilin.



– Ne, pluŝa kato certe ne povas esti tute aparta kato, kiel ĉiam ĝi aspektus! Do, eble ŝi ricevos morgaŭ vere ĝustan vivantan katon?!

Annemarie suspiras kaj

sidigas ĉiujn katojn bonorde ree sur la litrandon ĉe la muro.

– Aĥ, se estus jam morgaŭ!

Sekvantan matenon la patrino gvidas Annemarie al sia naskiĝtablo.

– Kio do estas tio?

Meze de floroj kaj naskiĝpaketoj sidas ora kato. Kiel angulforma bulo ĝi aspektas. Ĝi estas kolorigita bunte. Per unu piedeto ĝi svingas antaŭen kaj malantaŭen.

„Ĝi estas tute aparta kato! Estas feliĉokato! Vidu unufoje. Annemanjo, ĝi gratulas vin pro via naskiĝtago!“



Annemarie diras tute nenion. La patrino vidas, kiel sur la vizaĝo de la infano estiĝas disreviĝo. Ŝi sentiĝas iomete malagrabla.

„Feliĉokato!“ ŝi ripetas, kiel konsole, „ĝi alsvingas la feliĉon! Kaj ĝi

povas plenumi dezirojn kaj ŝirmi vin! Ĉu vi ne ĝojas?“

Annemarie prenas la feliĉokaton en la manon. Kontraŭ ŝia atendo, ĝi estas tute malpeza.

– El plasto, pensas Annemarie. Ŝi turnigas la katon. – Bateriamovigo, klare!

Ŝi subenglutas siajn suprenirantajn larmojn.

„Do, jes, dankon panjo.“

**ĈE SAMOVARO**

Ĉe malnova samovaro  
sidas rusoj kaj hungaro.  
Dum la akvo zume bolas  
la amikoj ekparolas:

“Havi landon en libero,  
tamen migri tra la tero,  
iri vojon, sed sencelan...  
Ĉu vi konas pli kruelan?”

La hungaro ne respondas,  
liaj pensoj ĝeme ondas,  
viŝas larmon retenitan:  
“Havi landon, sed perditan...”

Ĉe malnova samovaro  
sidas rusoj kaj hungaro.  
Dum la akvo bolas zume  
ili ploras, ploras kune.  
(1926)

**ESTAS MI ESPERANTISTO**

Verda stelo sur la brusto  
iom palas pro la rusto.  
Mi ne estas purigisto;  
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento  
“Netuŝebla Fundamento”.  
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;  
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro  
putras mia SAT-vortaro.  
Tedas min la vorto-listo;  
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas  
kaj gazeton ne abonas...  
Librojn legu la verkisto;  
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:  
“Bonan tagon! Ĝis revido!”  
Ĝi sufiĉas por ekzisto;  
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikas,  
la gvidantojn dorne pikas  
kaj konspiras kun persisto;  
estas mi esperantisto.


Por la venko mi esperas,  
sed neniam mi ofertas.  
Mi ne estas ja bankisto;  
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo  
la movado, organizo,  
helpas mi nur per rezisto;  
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento  
el la buŝo Nova Sento.  
Ĝi sufiĉas por sofisto;  
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia  
staros “rondo familia”,  
nekrologos ĵurnalisto:  
estis li esperantisto.

(1933)




Fonto:  
*La Balta Ondo*  
<https://sezonoj.ru/2019/10/blk-6/>

**Viva memoraĵo**

**verkis kaj sendis Lenk Szász el Rumanio**

Mi havas vivan memoraĵon,  
sur fenestrobreto,  
ne pli ol dekcentimetra, verda.  
Tra la fenestro vintra pejzaĝo videblas,  
sed ĝi aperigas al mi la bluan maron,  
marbordan urbon en Turkio.  
Varma lumo plenigas mian animon...  
Sola mi vagadas en stratoj,  
muta pro nescio de la lingvo.  
Mi rigardas kaj fotadas  
la domojn, la maron, homojn,  
ĉio por mi nekutima.  
En angulo de infanludejo  
stranga dometo estas el ligno:  
loĝejo por katoj, katidoj.  
Nutraĵon alportas por ili virino.  
Mi ridetas, ŝi reridetas,  
ne bezonatas klarigo,  
sufiĉas la simpatio.  
Mi vagadis en stratetoj,  
falintan citronon surtere mi ekvidis.

Ĝi falis el citronujo.  
Citronujo!  
Citronon ĝis nun mi vidis nur en  
vendejo,  
sed neniam citronujon.  
Mi prenis la etan, verdan citronon  
kunportis ĝin, kiel „suveneron”.  
Ĝi flaviĝis en mia hejmo,  
kaj mi elprenis semon el ĝi,  
metis en teron, en florpoton,  
kaj jen la eta citronujo!  
Ĝi entenas la tutan Turkion:  
la etajn stratojn kun citronujoj,  
la ame nutratajn katojn,  
la maljunan komerciston,  
kiu helpis min trovi stratan  
telefonon,  
la insuleton kun blanka fortikaĵo  
en la bluega maro...  
Mia eta citronujo ĉe la fenestro,  
estas viva memoraĵo el Turkio.





## Ŝercoj



### CELTABULO

Kruko: Mi ĵus ricevis novan sageto-celtabulon. Mi volas peti vin pri io.

Jozefino: Se vi volas ke mi sagetoludi

kun vi, la respondo estas "ne".

Kruko: Ne, ne. Mi volis demandi ĉu vi havas foton pri via patrino!

\*\*\*

### KIA KRAVATO!

En la laborejo, Kruko montras kravaton al Lio, la sekretariino: Vidu, kion vi pensas pri ĉi tiu kravato kiun mi aĉetis kiel naskiĝtagdonaĉon por Baniko?

Lio: Ho, li ŝategos ĝin! Mi tuj povas vidi tion.

Kruko: Kiel?

Lio: Baniko havas aĉegan vestoguston!

\*\*\*

### BONGUSTAJ KUKETOJ

Kruko laboras ĉe la komputilo. Li konektiĝas al komerca retejo.

La ekrano montras: "Ĉi tiu retejo utiligas kuketojn. Ĉu vi akceptas? Ĉu vi rifuzas?"

Kruko ekstaras, paŝas al la ŝranko, kaj elprenas paketon.

Li residiĝas kaj malfermas la paketon.

En ĝi estas kuketoj. Li ekmanĝas.

Kruko: Tiu retejo ne estas la sola kiu utiligas kuketojn!

\*\*\*

tradukis **Rikardo Cash** el Francio  
publikigita kun lia permeso

Fonto: [esperanto-anekdotoj@googlegroups.com](mailto:esperanto-anekdotoj@googlegroups.com)



## Krucvortenigmo



### HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )


1. \_\_\_ estas kara, sed vero pli kara (Zamenhof); 6. Nobelan sinjorinon; 7. Simbolo por astato je kemio; 8. Konsonantoj de sed; 9. Konforma al regulo; 11. Amiko \_\_\_ kara, sed vero pli kara (Zamenhof).

### VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )

1. Malrapide (en muziko); 2. Estus en mato; 3. Unua silabo de imperiestro; 4. Havanta koston; 5. Ondadas; 10. Konsonantoj de sito.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7

<http://www.semajnodeenigmoj.com>



(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

## La Vivo (Az élet) verkis hungare, tradukis kaj sendis Adrienne Pásztor, el Hungario

Naturinfanon dum eduko  
la patro al la viv' preparas:  
sin kaŝi de l'malvarmo-indas,  
dum pluv' kaj vent' kaj suno  
karas.


Ho, ĉasi kaj viandon baki  
kuraci, plugi instruadis  
praul' la filon, kaj bredadi -  
kaj ĝis la vera venk' luktadi.

Se nun plenkreskas la infano,  
atendas lin tuj senlaboro.  
Estas diplom' kaj koro ama  
ja vanaj en la grava horo.

La vivkondiĉoj malriĉiĝas,  
la parenkaro ne juniĝas -  
kaj kiam venas naskiĝtagoj,  
donacoj jam ne kolektiĝas.


Donaco estas mem la vivo,  
se vi finvivi sana povas:  
labor', nutraĵo se troviĝas,  
se samhejman' hejmanon  
fidas.

(2007)



Ĉi-semajne, Venuso kaptis ĉies atenton, kiam sciencistoj anoncis la malkovron de ebla indiko de vivo. Tio estis surprizo, pro tio ke Venuso ne estas la plej populara kandidato en la serĉo por eksterteranoj. Ĝi estas la plej proksima planedo laŭ minimuma distanco kaj ĝi estas pli-malpli same granda kiel la Tero. Kvankam ĝi antaŭe eble pli similis al la Tero, ĝi hodiaŭ estas infera mondo kun averaĝa surfaca temperaturo de 464°C kaj densega atmosfero, kiu konsistas el pli ol 95% de CO<sub>2</sub> kaj nuboj el sulfata acido. Estas tute klare ke la kondiĉoj sur la surfaco estas multe tro severaj por eĉ la plej duraj Teraj mikroorganismoj, sed ekzistas partoj de la atmosfero kiuj estas relative mildaj. Oni povas senfine filozofi pri tio, sed oni ja pripensu: Kion la sciencistoj trovis kaj kion ili ne trovis?

La publikaĵo "Phosphine gas in the cloud decks of Venus" (Fosfina gaso en la nubaro de Venuso), kiu publikigis ĉi-semajne, priskribas kiel grupo de sciencistoj trovis fosfinon (PH<sub>3</sub>) en la atmosfero de Venuso per spektroskopio kaj konfirmis tion per du malsamaj teleskopoj: la JCMT sur Havajo kaj ALMA en norda Ĉilio. Ili studis lumon kun ondolongo de 1,123 mm, ĉar specife fosfino absorbas tian lumon, kaj uzis multe da matematiko por forigi bruon kaj konfirmi ke ili fakte observis la gason. Ĝi estis plej abunda ĉe la mezaltaj latitudoj kaj malplej super la polusoj.




*Fosfino konsistas el unu fosfora atomo (oranĝkolora) kaj tri hidrogenaj atomoj (blankaj)*

Fosfino en Venuso estas interesa trovo pro la atmosferaj kondiĉoj tie. Oni antaŭe observis la gason en la atmosferoj de la gasgigantoj Jupitero kaj Saturno, sed ili havas tute malsaman ĥemian medion. La atmosferoj de la gasgigantoj estas reduktantaj, kio igas molekulojn kiel fosfinon pli stabilaj, dum la atmosferoj de Venuso kaj la Tero estas oksidantaj, kio igas ilin malstabilaj. Por kalkuli kiom rapide la gaso estas produktata, oni bezonas kompreni kiom stabila la molekulo estas, ĉar tio influas kiom longe la

molekulo restas en la atmosfero antaŭ disfali. La koncentriteco de molekuloj en la atmosfero povas esti alta se ili disfalas malrapide, aŭ se ili estas produktataj rapide. Per kompleksaj modeloj, oni povas kalkuli kiom longe molekulo de fosfino travivas en malsamaj tavoloj de la atmosfero kaj per la faritaj observoj, oni povas taksii la totalan kvanton de fosfino, kies taksita koncentriteco estas ĉirkaŭ 20 ppb\*. Kombinante tiujn informojn, la sciencistoj povis konkludi ke Venuso devas produkti 106-107 molekulojn cm<sup>-2</sup>s<sup>-1</sup> por subteni la observitan koncentritecon.



\* *ppb (parts per billion) estas mezurunuo de koncentriteco, kiu signifas "miliardono de la maso". Se la koncentriteco de fosfino estas 20 ppb kaj oni prenas 20 miliardojn da gramoj da gaso el la atmosfero, tiu gaso enhavus 20 gramojn da fosfino.*



*Fosfino estas pli stabila en la atmosferoj de gasgigantoj kiel Saturno kaj estas kreita de nebiologiaj procezoj tie.*

Venuso estas kompleksa planedo kaj klarigi la rapidecon de la produktado de fosfino ne estas facila tasko. La sciencistoj esploris multajn eblajn fontojn kiel interagojn inter la sunlumo kaj la atmosfero, vulkanismon kaj aliajn geologiajn procezojn, fulmojn, meteoritojn kaj tiel plu. Aldone, ili faras la samajn kalkulojn uzante milojn da malsamaj atmosferaj kondiĉoj kaj neniu kombino de konataj procezoj produktas sufiĉe da fosfino por klarigi la observitan koncentritecon. Tio lasas tri eblajn klarigojn, el kiuj du estas ekscitaj. Unue, ĉiam povas esti ke la observoj aŭ kalkuloj estis eraraj. Due, povas esti ke la fosfino estas produktata de ankoraŭ nekonata procezo, kio signifas ke oni malkovros pli pri ĥemio sub eksterordinaraj kondiĉoj. Trie, kaj plej interese, povas esti ke la fosfino estas produktata de vivantaj organismoj.

Havas sencon sugesti ke la origino de la fosfino

povas esti biologia, ĉar la fosfino surtere estas plejparte produktata de vivantaj organismoj. Tiuj organismoj estas homoj kiuj produktas ĝin industrie, interalie kiel kontraŭbestan tokson, kaj anaerobaj mikroorganismoj. Oni jam dum dekjaraj fantazias pri vivo sur Venuso kun malsamaj gradoj de realismo, sed la koncepto ne estas tute sensenca. Pli frue en ĝia historio, la planedo multe pli similis al la Tero kaj eble havis akvon sur sia surfaco. Se oni konsideras kiom malmulte da tempo la Tero bezonis por produkti la unuajn vivantajn ĉelojn, Venuso certe havis sufiĉe da tempo por fari la saman, do se la kondiĉoj estis ĝustaj, la frua Venuso certe povus esti enloĝata. Hodiaŭ ekzistas mikroorganismoj surtere, kiuj travivas sufiĉe alte en la atmosfero kaj eble Venuso havis similajn mikroorganismojn kaj kun iomete da fantazio oni povas imagi kiel tiuj mikroorganismoj grade adaptiĝis al la severaj kondiĉoj kiam la klimato de Venuso ŝanĝiĝis.

Kvankam la ideo estas alloga, estas giganta salto inter la detektado de nova gaso kaj la konkludo ke Venuso estas enloĝata. Antaŭ ol konkludi ion tian, oni devas detale pripensi kiel la organismoj povus travivi kaj reproduktiĝi, kiel ilia metabolo funkcias kaj

kial ili produktus fosfinon, kio kostas energion. Kolekti pruvojn pri ĉiuj el tiuj aferoj por krei koheran teorion estus granda laboro kaj daŭrus multajn jarojn aŭ eĉ jardekojn. Feliĉe ja estas aliaj kialoj por festi. La malkovro igas Venuson pli populara inter sciencistoj kaj la ĝenerala publiko, kio eble igos estontajn esplorojn pli facile organizeblaj. La aŭtoroj de la publikaĵo substrekas ke oni studu ankaŭ aliajn ondolongojn de la spektro de Venuso por konfirmi la detekton kaj, ideale, ke oni sendu novajn sondilojn al la planedo por fari surlokajn eksperimentojn. La spertoj kiujn sciencistoj gajnas de esplori atmosferojn en nia Sunsistemo ankaŭ povas esti aplikataj en la esplorado de ekstere-sunsistemaj planedoj, kio malfermas milojn da novaj mondoj. Finfine, la esploro, same kiel ĉiuj aliaj esploroj kiuj atingas la novaĵojn, inspiras junajn homojn, kiuj estontece tiros sciencon antaŭen kaj, eble, malkovros eksterterulojn.

Frank Van Hertrooij el Nederlando

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2020/09/18/kio-okazas-en-la-nuboj-de-venus/>

5>> poeto kaj muskedisto, kiu inspiris la teatraĵon de Edmond Rostand. Ni venu al iu plej konata verko: la romano "Vojaĝo al la Luno" de Jules Verne en 1865. Kaj nun ni alvenu al la kino arto sen paroli plue... Georges Méliès, la pioniro de la kino arto, iluziisto, ludilfaristo, produktanto-reĝisoro kaj aktoro, adaptis ĉi tiun romanon al kino kaj fariĝis la pioniro de sciencfikcia kino. (Se vi ankoraŭ ne faris tion, spektu la filmon Hugo Cabret reĝisorita de Martin Scorsese! Ĝi estas grandioza omaĝo kaj respekto al Georges Méliès kaj la kino arto.)

Se temas pri Marso aŭ la Marsanoj, la jenaj verkoj estas pioniroj: "La Milito de la Mondo" (1898, HG Wells), la "Ruĝa Stelo" (1908, Alexander Bogdanov), kaj "Marsa Epopeo" (1934, Stanley G. Weinbaum). Alia ne tiom konata filmo estas la dana "Himmelskibet" (1918).

En ĉi tiu artikolo mi mencias du sovetiajn filmojn "Aelita - La reĝino de Marso" (1924) kaj "Kosma Vojaĝo" (1935)

"**Aelita - La Reĝino de Marso**" estas taksata kiel la unua plenlonga sciencfikcia filmo en la historio de kino. Ĉi tiu silenta filmo malfermiĝas per kodita mesaĝo: "Anta ... Odeli ... Uta ..." (kripta vorto same al "Rosebud" en la filmo "Civitano Kane"). La dato estas la 4-a de decembro 1921. Ĉi tiu stranga mesaĝo, kiu iras al ĉiuj radiostacioj en la mondo,

altiras la atenton de nia heroo, inĝeniero Los, kiu laboras ĉe la Moskva Radio-Stacio.

La filmo pluiras en tri niveloj: unue la sonĝo de inĝeniero Los iri al Marso kaj ties laboroj kun lia kolego Spiridonov, due Nataŝa, la edzino de Los, kiu laboras en la Centro de Evakuado de la Fervoja Stacio Kursky, kaj la gluiĝema, ruza Victor Erlikh, kun kiu ŝi konatiĝis tie, kaj fine la vivo sur Marso.

Estas kvar karakteroj sur Marso: la marsa reĝino Aelita, ŝia servistino Ikhoskha, la marsa estro Tuskub, kaj Gor, la energia ĉefo de la planedo. Fakte, Aelita ne havas efikon sur la estrado de marso ĝis Los venos al Marso.

Iri al Marso estas la fiksa ideo de Los. Dum li daŭre laboras por tio, li dubas pri la rilato de sia edzino Nataŝa kun Erlikh, la sovetia ŝtatoficisto. Erlikh estas homo, kiu subtenas antaŭrevoluciajn burĝajn kutimojn, li amas monon kaj distradon. La sceno "Balo de la Elektitoj" en la filmo reflektas, ke la revolucio ankoraŭ ne estis digestita de kelkaj homoj. Tuj kiam grupo de geviroj, kiuj kamuflas siajn balo-robotojn pere de malriĉaj kaj mizeraj kostumoj, eniras la subteran salonon, ili demetas la vestaĉojn kaj kaŝe de la revolucia registaro amuziĝas sin.

Nu, en ĉi tiu sceno, Nataŝa ne feliĉas. Kvankam Erlikh komplimentas ŝin per mildaj vortoj, ŝiaj pensoj estas kun ŝia edzo Los. Aliflanke Los troviĝas en la kaptio de ĵaluzo same kiel la ideo iri al Marso. Kaj iun



*Servistino  
Ikhoskha  
(Aleksandra  
Peregonets)  
kaj  
reĝino Aelita  
(Yuliya  
Solntseva)  
(1924)*

tagon, kiam li revenas de sia laboro ekster la urbo, li rimarkas, ke ilia luanto Viktor Erlikh, estas en la supra etaĝo kun sia edzino, li do elpenas sian pafilon kaj pafas Nataŝan. Tamen la virino estas senkulpa. Los forkuras. Poste li alivestiĝas kaj prenas la lokon de sia kolego Spiridonov. Kune kun la soldato de la Ruĝa Armeo, Gusev, kiun ni vidas en kelkaj scenoj ekde la komenco, eniras la kosmoŝipon kaj ili iras al Marso. Dume, Kravtsov, kiu pretendas esti detektivo postkurante Los'on, aldonas amuzajn elementojn al la filmo kaj erare li trovas sin en la kosmoŝipo. Ĉiuj tri alteriĝas sur Marson. Amrilato komenciĝas inter Aelita kaj Los. Sur Marso regas sklavoro. Los parolas pri libereco al la sklavoj kun la spirito de la Oktobra Revolucio kaj instigas ilin al ribelo. La Marsa Reĝino Aelita, kiu ĝis tiam ne havis iun ajn influon sur la estrado de la planedo, fariĝas lia subtenanto. Sed post transpreno de la povo ŝi starigas sian propran diktatorecon. La revo de Los pri la Unio de Marsaj Sovetiaj Socialismaj Respublikoj estingiĝas. (La sinsekvo de kvadratoj, kiuj montras martelon kaj rikoltilon kaj muskolan laboriston estas ekzemploj de la propogandisma stilo de tiuj jaroj.) Dum Los kaj Aelita luktas unu kun la alia, ni, kiel spektantaro, subite trovas nin denove sur la Tero. Evidentiĝas, ke tiu stis revo de Los. Afiŝoj de "ANTA, ODELI, UTA" algluitaj sur la muroj! Ni komprenas, ke ĉi tiu mesaĝo estis marko de radoj. La "Rosebud" mistero solvita!... La mistera vorto en le filmo "Civitano Kane" estis la nomo de sledo, ĉi tie marko de radoj!

Kompreneble, la lastaj scenoj sur Marso, kiujn mi ĵus priskribis, estas efektive tre mallongaj. Ĉiuokaze la tuta filmo eĉ ne estas 1,5 horojn longa. La filmo estas adapto de la romano de Aleksej Tolstoj el la jaro 1923. Sed mi tuj diru al vi, ke la romano estas pli volumena, kaj ĝia scienca aspekto estas pli reganta kaj tute alia. Kvankam la filmo estas konsiderata unu el la unuaj kaj plej bonaj ekzemploj de sciencfikcia kino, ŝajnas al mi,

ke la scenoj sur la tero estas pli imponaj al tiuj sur Marso.

"**Kosmicheskiy Reys**" (Kosma Vojaĝo), filmita 11 jarojn pli poste, estas sufiĉe sukcesa laŭ scenejaj dekoracioj, kaj precipe la raketaj scenoj. Kompreneble malantaŭ ĉi tiu sukceso estas la sciencisto, sperta raketisto Konstantin Ciolkovskij. Li estas unu el la tri sciencistoj, kiuj montris al homoj, ke spacvojaĝado ne estas sonĝo. La aliaj du estas: Robert H. Goddard kaj Hermann Oberth. Plurtavolaj raketoj, satelitaj stacioj, spacaj kolonioj estas kelkaj el liaj sugestoj. Li publikigis pli ol 400 sciencajn artikolojn, librojn kaj romanojn dum sia vivo. Li fondis la unuan aerodinamikan laboratorion de Rusio (en sia apartamento) kaj en 1897 konstruis la unuan ventotunelon de la lando. Ciolkovskij estis plene memlernanto kaj krom ĝia scienco li ankaŭ interesiĝis pri la filozofio de spacvojaĝoj. Direktoro Vasily Zhuravlyov faris bonan kunlaboron kun li. Vi povas vidi foton kiu montras ĉi tion. Nur la scenejo sur la Luno ŝajnis al mi iomete teatra. Ĝi ne estas tiel konvinkiga, kiel la raketa centro, kaj plie ekzistas malkonsekvenco rilate al la sengravita medio. La aktoroj foje flugas sed foje marŝas kiel sur la tero.



*Art-direktoro Yuri Shvets, teknika kaj scienca kosilanto verkisto Konstantin Tsiolkovsky kaj direktoro Vasili Zhuravlyov*

Laŭ Janne Wass; "Kiam Zhuravlyov, kiu estis edukita aktoro, komencis labori sur la filmo en 1933, li jam direktis filmojn, de dokumentaj filmoj kaj komedioj ĝis komunismaj porinfanaj filmoj kiel "La Bombisto" (The Bomber) kaj "Revanĉo aŭ Venĝo" (Revanzh). Ĉi tiu filmo estas adapto de la libro de raket-sciencisto kaj verkisto Konstantin Ciolkovskij "Preter Planedo Tero" (Vne Zemli) en la jaro 1920, sed la intrigo apenaŭ similas al la originala rakonto de internacia teamo de aventuristoj, kiuj ekloĝas en spaco por longa tempo."

La filmo peze baziĝas sur la rakonto prezentita en la filmo "Virino sur luno" (Woman on the Moon) de



usonaj filmoj. Ekzemple: registraĵoj montras, ke preskaŭ 200 sovetaj sciencfikciaj verkoj, inkluzive de romanoj, rakontoj, poemoj, teatraĵoj kaj filmoj, estis publikigitaj inter la jaroj 1920 kaj 1930. En 1927, kiu estas konsiderata la plej alta punkto de la rusa eldonado, aperis 50 verkoj,

Fritz Lang. Profesoro Sedikh estas tre ĉarma sciencista karaktero. Aminda kiel Patro Kristnasko. Profesoro Marina kaj la pasia, ekscitita knabo Orlov, kiuj iris al la luno kun li, ankaŭ aldonas koloron al la ago de la filmo. Precipe Orlov similas al la simbolo de la dinamiko kaj estonteco de la juna Sovetunio. Domaĝe, ke ĉi tiu aktoro poste malaperis. Li estus tre sukcesa, se li daŭrus sian karieron en kino. En ĉi tiu filmo, estas la konflikto de sciencisto pasia pri spaco kaj luno kun prof. Karin. La konflikto finiĝas kiam maljuna Sedikh sukcesas alteriĝi sur la lunon kaj revenas al la mondo kun siaj amikoj malgraŭ tro da malfacilaĵoj. Cetere ili trovas kaj revenigas la katon, kiu laŭsupoze estis perdita sur la luno dum unu el la antaŭaj testflugoj. Tio estas feliĉa fino! La triumfo de Sedikh, de scienco, de entuziasma Orlov kaj solidareco.

kiujn oni povus konsideri grandegaj por ties historio. Krom tio, ni renkontas pli ol 200 tradukojn el fremdaj lingvoj, precipe de Jules Verne kaj H.G. Wells. Kompare kun la tiutempa eŭropa kaj usona sciencfikcio, la soveta sciencfikcio havis pozitivan kaj optimisman perspektivon pri la estonteco. "Sed eĉ en ĉi tiuj pozitivaj utopioj, eblis trovi aludojn kiel antaŭvidon de la malhelaj tagoj, kiuj venos kun la stalinisma periodo." (citaĵo el İsmail Kızılkılıç)

Se vi volas spekti la spegulbildojn de nia scivolemo atingi la ĉielon en la infaneca epoko de kino ĉi tiuj filmoj estas tre bonaj.

Konuralp Sunal  
26-a de januaro 2021  
Büyükdada – İstanbulo

Mi pensas pri la hundo Laika, kiun oni konscie sendis al morto en 1957 pere de la kosmoŝipo Sputnik 2. Pri tio estas konfeso de Oleg Gazenko. Ankaŭ antaŭ ĝia fiaro, iu sciencisto prenis Laika al sia hejmo por ludi kun siaj infanoj. Poste en sia libro pri soveta kosma farmakologio, D-ro Vladimir Jazdovski diris "Mi volis fari ion belan por ĝi. Li havis malmultan tempon por vivi." Tiaj malĝojaj rakontoj kaj la regado de homo super bestoj ankaŭ formas la bazon de scienca evoluo.

<sup>1</sup> <https://astronomi.itu.edu.tr/genel/astronomi-tarihi-i/>

<sup>2</sup> <https://evrimagaci.org/kopernik-devrimi-gunes-merkezli-eyren-teorisi-ve-sonrasinda-dunyaya-bakismiz-nasil-degisti-5226>


<sup>3</sup> <https://rasyonalist.org/yazi/uzaya-cikis/>

<sup>4</sup> <https://www.hurriyet.com.tr/dunya/discovery-lagari-hasan-i-ucuramadi-14745104>

<sup>5</sup> <https://rasyonalist.org/yazi/uzaya-cikis/>

Mi menciis komence de mia artikolo, ke estas grandega kvanto de literatura mortero en la koro de ĉi tiuj du sovetaj sciencfikciaj filmoj kaj la sekvantaj

**H O, H O M A R O ! (aŭ invito al medito) verkis kaj sendis Gafur Mirzabaev el Uzbekio**

<b>Parto 5</b>  Sciante ĉion-ĉi ja pekaj Viaj daŭras Doninte al Vi la grundon la Tero bedaŭras!  Ĝi ne volis doni grundon en tiu komenckazo Por Via ekzistado dum tiu ekzistbazo.	Tiutempe Ĝi ne povis ne fari tiun donon, Ĝi obeis ĈefKreinton plenumis ordonon.	Kiam Vi turmentas Teron, Ĝian korpon premas Ne toleras Ĝi doloron kaj nevole ektremas.	
	Tiutempe Ĝi toleris Memorinte la ĵuron Ne povis lasi Vin kaj fari de Vi forkuron!	Por la Ĝia afliktado kaj por Ĝia doloro Kulpas Via malhomeco kulpas Via malmoro!	

Kiam ekas malsimpatii,  
ekas Ĝia kolero  
Komenciĝas kataklismoj  
kaj plagoj sur Tero!

Poste ploros la Ĉielo  
tuj Vin abomenante  
Verŝas siajn okullarmojn  
ne plu ja eltenante!

Kiam ekkoleras ili  
en tiuj malheltagoj  
Perdos Vi sian trankvilon  
Vin superŝutas plagoj!

Ĉi-ĉion la okazaĵojn  
kio estas sur Terfas'  
Ne sentigante Vin Supre  
La Dio mem kontemplas.

Okazinte ĉion- ĉi Vi  
tion indiferentas  
Dume Dio paciencas  
kiam Vi Devon sentas...

Ŝainas multaj el Vi tute  
forĝesis sian memon  
Kiam plibonigos Vin mem,  
plantas boncelsemon?!

Mi ne volas timigi Vin  
kaj ne volas tumulton,  
Mi nur volas al Vi Pacon  
dirante tiel multon!

Mi volas ke la verkaĵo  
al Vi forte influu!  
Kaj ankoraŭ kiel alvok'  
tra la mondo disfluu!

Pro via maldecagado  
aro de plag' venas  
Sur la Ter' ĉiu estaĵo  
kune Vin abomenas!

Kiel Via veramiko  
mia ĉefa cel' nura  
Averti: ke proksimiĝas  
io komunterura!

Sur la Tero diversloke  
ja terure torentas  
En alia regiono  
pli impetege ventas!

En alia angul' de l' Ter'  
permanente inundas  
Aliloke hom' memvole  
unu alian vundas!

Ĉe marbordoj cunambatas  
Aliloke tornadas,  
Mi ne vidas pacan lokon  
ĉie io invadas!

La Homaron ĉie io  
senĉese forte batas  
luloke iu festas  
aliloke malsatas.

Ĉiutage en la Mondo  
iuj senfine veas!  
Amasmortas tutaj gentoj  
kaj sennombre pereas!

Malaperas ĉefnutraĵo —  
mankas freŝaero!  
Malpuriĝas Via Korto,  
Via lulkorbo — Tero!

Je la fum' de Via "ating"  
la urboj plen-plenas  
Vin forlasas freŝaer'  
Vi mem kulpas, sinĝenas!

Malpurigas Vi aeron,  
kaj akvon malpurigas  
Vi mem perdas la bonaĵon  
Iliajn vojojn digas!

Travideblan, puran akvon  
la maroj mem bezonas  
Ankaŭ maranimaloj plu  
tian akvon ne konas.

Ne miru! Mia verkaĵo  
ĉio-ĉi pure veras  
La estaĵoj de la Mondo  
pereas, malaperas!

La Aero, Akvo, Tero  
Je malpuro sin vestas!  
Ĉefkulpante tion, kara  
Vi ĝoje dancas, festas!

Pardonpetu ilin ĉiujn,  
ne forĝesu la punon!  
Ne forĝesu ĉefrespondon  
ne pensu nur la nunon!

Vi ne pensas ĉefjuĝtagon,  
ne sentas ties timon  
Ĝoje saltas, gaje dancas  
ne ĉesigante krimon!

Lastjarcente Vi sur kolon  
pezan pekon alligis  
Disvundinte tutan Teron  
Kosmon maltrankviligis.

Jen demando al vi de mi,  
demando de la verso:  
Kion faras Vi kaj kion  
serĉas en Universo?

Jen al Vi ĉefdemando kaj  
jen al vi tutmondvoko:  
Ĉu jam mankas por Via gent'  
sur la Tero loĝloko?

Sed Vi lasu la Universon  
tuj ĉefhejmen revenu!  
Doni trankvilvicon al Ĝi  
la Kosmon ne plu ĝenu!

Ĉiufanke Vin ĉirkaŭas  
senĉese la kulpondo  
Jen rezulto: suferas Vi  
kaj suferas tutmondo!

Se forĝesis Vi, mi al Vi  
memorigas la Veron  
Venos tempo kaj Vi nepre  
revenos en ĉi-Teron!

(daŭrigota)

Post la lernejo Annemarie hodiaŭ ne iras en la infanvartejon, ankaŭ ne al iu alia loko kiel alikaze ofte. Ŝi tuj iras hejmen. La feliĉokato ankoraŭ staras sur la naskiĝtablo.

Annemarie prenas ĝin ankoraŭ foje. La svingantan piedeton oni povas haltigi kaj denove ekpuŝi. Sed krom tio, ĝi ne estas taŭga por io – ne unufoje karespremi oni povas la malmolan plastoĵon! Seniluziigate kaj ĉagrenate ŝi ĵetis la oran bulon en ŝian katojgalerion. La feliĉokato plu svingas la manon. Jam Annemarie bedaŭras, ke ŝi ĵetis ĝin.

– Ĝi ne estas kulpa pro tio, ke mi ne ricevis ĝustan katon!

... Se ĝi vere estas feliĉokato ... Sed patrino ja

diris tion ... kaj plenumi dezirojn ĝi ankaŭ povas? Reale Annemarie ne kredas tion. Fine ŝi ne plu estas malgranda stulta infano! Je la Sankta Nikolao ŝi ne plu kredas ekde longe.

Kiel devus tiu ĉi plastobesto helpi al ŝi? Do, eble ja? Iel dezirojn plenumi – do, oni povus ... Kial ŝi ne mem havigus katon?! Patrino skoldos ŝin? Nun, kial ŝi – Annemarie – estus ŝulda je tio, se la feliĉokato plenumas ŝian kordeziron? Panjo fine mem diris tion!

(daŭrigota)

verkita kaj tradukita de **Margarate Bastian**  
el Germanio

metalpordo. Antaŭ ili ekaperis la pejzaĝo de la planedo. La maŝinvorto daŭrigis: „Nun mi sciigas la vojaĝcelon de via ekspedicio. Bonvolu atenti, ĉar nur unufoje ĝi estos konigita. Sur tiu ĉi malproksima planedo vivas danĝeraj estuloj, kiuj minacas la vivon de la tera homo. Via tasko estas pereigi la ĉi-tiean civilizacion per viaj grandefikaj biologiaj kaj ĥemiaj armiloj. Ĉion faru tiel, kiel vi lernis en la surtera astronauta akademio. Neniun indulgu, ĉar nun en via mano estas la sorto de la homaro.“

La astronautoj interrigardis kaj diris nenion. Ili sentis ke la vojaĝcelo ne estos ĉiutaga, sed neniu kuraĝis suspekti, ke ili devos ekstermi la tutan loĝantaron de ĉi planedo.

En iliaj tornistroj estis ujoj, kies enhavoj disŝutitaj infektos la ĉi-tieajn estaĵojn kaj baldaŭ dum unu du tagoj ĉiu pereios.

La planedo estis eksterordinare belega. Kien ili alvenis, ĉio similis al tera pejzaĝo. La kosmoŝipo alteriĝis sur granda flora kampo. En la malproksimo vidiĝis altaj, bluaj montoj. Maldekstre de ili la astronautoj ekvidis loĝlokojn, kie homsimilaj estaĵoj laboris en ĝardeno. El iu ĝardeno ekkuris malgranda blanka hundo al ili kaj laŭte bojis. Ĝi ne estis malamikema, ĉar ĝi gaje svingadis sian

voston.

„Atentu!“ ekkriis Petro, la kapitano de la astronautoj. „Danĝera estaĵo proksimiĝas. La armiloj estu pretaj!“

„Ĉe la loĝlokoj mi vidas monstrojn, kiuj ĝuste nu intencas ataki nin,“ aldonis serioze la alia astronauto kaj eliris sian laseroarmilon direktante ĝin al la proksimiĝanta hundo. Ekscitite li flustris al la tria astronauto, kiu iris malantaŭ li: „Vi devos likvidi la proksimiĝantan estaĵon. Ĉu vi komprenis?“

„Mi ne volas mortpafi mian ŝatatan hundeton Bodri\*,“ ekkriis plorante la tria astronauto, kiu estis

Joĉjo, la plej juna frato de Petro. „Ĝi ne estas danĝera estaĵo. Mi tre ŝatas ĝin.“

„Ĝi estas nur ludo,“ provis du knaboj trankviligi Joĉjon, „ni estas astronautoj kaj per nia kosmoŝipo ni alvenis tien ĉi por ekstermi ĉiujn estaĵojn. Ja, komence ankaŭ vi volis ludi tiel.“

„Nun jam mi ne volas, ĉar mi amegas mian hundeton. Ni ludu tiel, ke ni alvenis amikeme kaj portis donacon por Bodri.“

La knaboj interrigardis denove kaj diris: „Ankoraŭ vi estas tro malgranda por ludi serioze.“

Apáti Kovács Béla

\* *Bodri* – ŝatata nomo de hundoj en Hungario

Fonto: **Legolibreto 2** de Jindřiška Drahotova



## Solvo de la krucvortenigmo

S	V	L	S	E
V	L	S	U	Ĝ
D	S		L	V
N	O	M	V	D
O	K	I	M	V

**TRI ARTIKOLOJ EL LITERATURA FOLIO  
„VESPERTO“**

espbela@axeloro.hu

**Kie estas Esperantujo?**

Antaŭ nelonge mi kaŝaŭskultis babiladon de du viroj. Ili diskutis ĉu Esperantujo ekzistas. Ĉu ĝi estas reala lando aŭ ĝi ekzistas nur en fantazio.

„Esperantujo ne ekzistas.“

„Kial vi pensas?“

„Ĝi estas nur elpensita kaj ĝi ne estas sur la mapo. Tion mi certe scias.“

„Ĉu vi serĉis ĝin?“

„Jes, kompreneble. Horojn mi pasigis super la mapo, eĉ alitage mi telefonis al mia olda geografia profesoro esperante, ke li scipovas helpi en tiu ĉi grava demando.“

„Kion li diris?“

„Li nur ridis kaj moke diris: Ej, filo mia, vi estas granda azeno! Jam iam en gimnazio vi serĉis Turkion sub la tablo. Al vi decus scii, ke Esperanto estas internacia lingvo parolata en la vasta mondo. Esperantujo estas la tuta terglobo.“

„Ja, tiam ni vivas en Esperantujo. Ĝis nun mi ne sciis tion. Interese. Sed kie estas ĝia landlimo? Ĉar lando sen landlimo ne povas ekzisti. Mi ne komprenas. Ĉu vi?“

???

-FERKE

**Malfacile decidebla puno**

Al mi, kiel respondeca inspektisto en distrikta kleriga servo, venis informo, ke en renoma mezlernejo okazis ŝtelo fare de lernanto. Estis ŝtelita nova, moderna, multekosta jaketo, apartenanta al lernantino. La ŝtelinto – samklasa, bona lernantino, filino de malriĉa nobla familio.

Krom miaj oficaĵoj devoj mi deziris ankaŭ ekkoni pli profunde tiun ĉi okazaĵon, ĉar similaj fenomenoj lastatempe estas ofte renkontataj en iuj lernejoj.

Mi invitis la lernantinon por interparoli kun ŝi. Mi proponis al ŝi seĝon, starigis diversflankajn demandojn por komenci trankvilan interparolon. Fine mi demandis ŝin, ĉu estas vero pri la jaketo. Je mia

ega surprizo ŝi respondis klarvoĉe, levante la kapon:

„Sinjoro inspektisto, mi ne ŝtelis la jaketon, mi nur deprenis ĝin! Ektedis al mi, al ĉiuj gelernantoj, samklasanoj, ŝiaj senfinaj laŭdadoj, ke neniu el ni povus posedi similajn vestojn, kaj ke ŝiaj tolaĵoj sube kaj supre estas nature silkaj, aĉetebblaj nur por oro. Precipe tio ĉagrenas malriĉajn gelernantojn, kiuj ĉiutage vestas sin per aŭ malnovaj, aŭ flikitaj vestoj, aŭ tiuj de siaj pli aĝaj efratoj. Ŝi diras ofendajn vortojn pri niaj modestaj vestaĵoj. Mi petegas vin kompatu mian koron kaj animon! Mi neniam vestus min per tiu jaketo, ĝi tute maltaŭgas por mi. Mi nur prenis ĝin kaj ĵetis ĝin en barelon por rubaĵoj. Mi faris tiun ĉi agon plenumante la deziron de ĉiuj samklasanoj. Mi meritas kaj atendas vian punon.“

Mi liberigis tiun ĉi junan sinceran, bonan lernantinon, dirante al ŝi, ke punon mi difinos poste kun ŝia klasgvidanto. Ĝis nun mi tamen ankoraŭ ne estas decidinta pri ŝi. Se vi estus sur mia loko, kiel vi agus? Ĉu tio estas ŝtelo? Mi atendas vian konsilon. Eble estu tio instruista, pedagogia eksperimento!

IvanMinĉev, Bulgario.

**Vojaĝo al la steloj**

Antaŭ ol tri astronautoj povis surpaŝi la planedon mankis kelke da terhoroj. Ili jam delonge atendis tiun ĉi momenton. Dum la vojaĝo ili ofte revadis pri la alveno. Ili ne sciis kio atendos ilin sur la planedo. Ili ekscitite surmetis la skafandojn kaj atendis la ĝustan tempon por ekiri. La minutoj rampis ege malrapide, kiel heliko. Ili ĉiuj jam volonte promenintus sur la surfaco, ja pro tiu ĉi planedo ili traflugis tiun ĉi gigantan distancon.

Ili vojaĝis pli ol tri terajn jarojn ĝis la kosmoŝipo alvenis tien ĉi. La celo de ilia vojaĝo estis nekonata. Kiam malfermiĝos la pordo, tiam ili ekscios, kial ili devis vojaĝi al tiu ĉi malproksima planedo.

Subite el laŭtparolilo estis aŭdeble: „Post dudek sekundoj la pordo malfermiĝos... Preparaĝu!“ – La maŝinvorto komencis nombri la tempon reen – 20... 19... 18... 17... 16... La koro de la astronautoj komencis rapide pulsadi – 5... 4... 3... 2... 1... ek! – aŭdiĝis la ordono kaj malrapide suprenleviĝis la dika

>>>31

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds